

Ekstra aldono
Katalogo de FEL

Monato


INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

TURISMO

Boataventuro en la Andoj

Liplegadon

Lingvo por surduloj



Prezoj

		MONATO		LA JARO
		surf.	aere	aere
Aŭstralio	AUD	72	81	11
Aŭstrio	EUR	39	44	5
Belgio	EUR	39	44	5
Britio	GBP	29	32,6	3,6
Danio	DKK	298	336	38
Finnlando	EUR	39	44	5
Francio	EUR	39	44	5
Germanio (ok.)	EUR	39	44	5
Germanio (or.)	EUR	32	37	5
Hispanio	EUR	32	37	5
Irlando	EUR	39	44	5
Islando	EUR	39	44	5
Israelo	EUR	32	37	5
Italio	EUR	39	44	5
Japanio	JPY	5900	6760	860
Kanado	CAD	67	76	9
Luksemburgo	EUR	39	44	5
Nederlando	EUR	39	44	5
Norvegio	NOK	340	384	44
Nov-Zelando	NZD	83	94	12
Pollando	PLN	70	90	20
Portugalio	EUR	28	33	5
Sud-Afriko	EUR	32	37	5
Svedio	SEK	369	418	49
Svislando	CHF	65	74	9
Usono	USD	47	53	8

Reta versio 60% de la surfaca tarifo

Aliaj landoj: Petu la tarifon de la landa peranto, aŭ, se tiu ne ekzistas, de la eldonejo: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. Telefono +32 32 34 34 00; telekopilo +32 32 33 54 33; retpoŝto: monato@fel.esperanto.be.



1. Rimedoj tute senkostaj:

- 1.1. Se vi havas kurantan konton ĉe FEL, kiu estas kredita, simple petu ke ĝi estu debetita.
- 1.2. Se vi havas konton ĉe UEA, kiu estas kredita, sendu ĝirilon. La kontokodo de Flandra Esperanto-Ligo ĉe UEA estas fela-x.
- 1.3. Se vi havas konton en usona banko, sendu al ni ordinaran bankĉekon. En tiu okazo la valuto devas esti la usona dolaro.

2. Rimedoj kiuj estas senkostaj en la alvenlando (Belgio) sed eble kostas en la forirlando (via lando):

- 2.1. Petu vian poŝtoŝecojon pri internacia poŝtmandato je nomo de Flandra

Al kiu pagi?

al via landa peranto

Aŭstralio: Libroservo de AEA, Esperanto-Domo, 143 Lawson Street, Redfern, N.S.W. 2016 Aŭstralio. R: esperfed@ans.com.au

Aŭstria: AEM, Margarethengürtel 100 11/2, 1050 Wien. Banko: Die Erste, konto 000-99511. R: esperanto.aem@chello.at

Belga: FEL, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). R: monato@fel.esperanto.be.

Brazila: BEL, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia (DF). R: bel@brnet.com.br.

Britaj: Paul Hewitt, 26 Highfield Road, North Thoresby, Great Grimsby, South Humberside, DN36 5RT. R: paul@esperanto.freeserve.co.uk.

Ĉeĥa: Vladislav Hasala, A. Dvořáka 1, CZ-696 62 Strážnice. R: vlada_hasala@iol.cz.

Ĉina: *El popola Ĉinio*, P.O. Kesto 77, 100037 Beijing. R: libroservo@china-report.com.

Dana: Revuservo de DEA, c/o Frederik Eriksen, Finsensgade 10, DK-4800 Nykøbing F, Danio. Tel.: +45 54 82 95 86/PTel.: +45 40 53 25 06. Rete: frederikeriksen@post.cybercity.dk.

Estona: Virve Emits, Mahla 65-1, EE-0012 Tallinn.

Filipina: Manfred Führer, Dalongue 2419 Santa Barbara, Pangasinan. R: fam.fuehrer@t-online.de

Finnaj: Heta Kesälä, Kalamiehenkuja 3D32, FIN-04300 Tuusula. Konton-ro: 800029-19438647.
• *Oy Mendoservo Ak*, Kivistöntie, FIN-05510 Hyvinkää, pĉk. 427 72-2.

Francaj: UFE, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). R: esperanto-france@esperanto.org
• Esperanto-Klubo de Metz, 36 rue St. Marcel, 57000 Metz. R: eo-metz@osiek.org

Germanaj: Hilde Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg (LIGA Augsburg 113514, BLZ 720 903 00) R: smaul86150@aol.com • S-ino Consuelo Führer, Am Stadtpfad 11, D-65760 Eschborn (Konto: 141471-603 ĉe Postbank Frankfurt am Main, BLZ 500 100 60. R: fam.fuehrer@t-online.de • Literatura-Servo „Espero“, Rolf Beau, Saxoniastraße 35, D-04451 Althen (Postbank Leipzig konton-ro: 010 2939 901 (BLZ 86010090) R: RoBo.ESPERO@t-online.de.

Hispana: Juan Azcuénaga Vierna, General Dávila, 127, portal 7, 2° izda., Santander (BBVA: 0182-3800-33-0203548535).

Hungara: *Attila Kovács, Barackos* u. 1, 7635 Pécs. R: akovacs@cosoft-bt.com.

Irlanda: Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12.

Islanda: Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-121 Reykjavik.

Itala: Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204).

Japanaj: Japana Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162-0042. R: jei@mre.biglobe.ne.jp.
KLEG, Sonehigasi 1-11-46-204, Toyonaka-si, Osaka-hu 561. R: kleg@mvf.biglobe.ne.jp.

Kataluna: KEA, Apartat 290, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions, Agència 461, konto 550/53).

Kanada: Kanada Esperanto-Asocio, P.O. Box 2159, Sidney, B.C., V8L 3S6. R: kanadano@hotmail.com

Korea: Korea Esperanto-Asocio, Kangbyon Hanshin Core B/D N-ro. 1601, 350 Mapo Dong, Mapo-gu, Seoul 121-703, Koreio. R: keast@soback.komet.nm.kr. • Seula Esperanto Kulturcentro, dir. Lee Jung-Kee, CPO Kesto 3047, 100-630 Seoul. R: esperant@unitel.co.kr.

Kostarika: Hugo Mora, Apartado 4981, 1000 San José. Reto miaumiau@sol.racsa.co.cr.

Kroataj: Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-41000 Zagreb. R: mbelosev@public.SRCE.hr • Višnja Branković, Via Leghissa 6, I-34131, Trieste. R: orbispictus@iol.it.

Latva kaj litova: Laimius Stražnickas, a.k. 1469, LT-2040 Vilnius 40, Litovio. R: stralaim@takas.lt.

Luksemburga: LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: 8936-12). R: esperlu@geocities.com

Nederlandaj: Libro-Servo Esperanto Nederland, Mamixstraat 57, NL-2023 RB Haarlem (pĉk.: 111278).
• UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. R: uea@inter.nl.net.

Norvega: Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. R: esperanto@online.no

Nov-Zelanda: Gwenda Sutton, 12c Herbert Gardens, 186 The Terrace, 6001 Wellington. Tel.: (04) 473 0847. Faksilo: (04) 473 0848. R: gwenda.s@ihug.com.nz

Portugala: PEA, R. Dr. João Couto, 6, R/C-A, P-1500 Lisboa. R: ap.esperanto@clix.pt

Pola: *Skribu al la eldonejo* kaj pagu al Danuta Leyk, konto 10201143-216586-270-41-111 ĉe PKO BP XIV 0/Wwa.

Rusa: Halina R. Gorecka, ab.ja 1248, RUS-236039 Kaliningrad, Ruslando. R: sezonoj@yandex.ru

Slovenaj: Višnja Branković, Via Leghissa 6, I-34131 Trieste. R: orbispictus@iol.it. • Jovan Mirković, Mirna 5, SLO-2000 Maribor. R: j.mirkovice@siol.net

Sud-Afrika: Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. R: cbeckford@freemail.absa.co.za

Svedaj: Esperanto-Skolan, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.ĝ. 355001-9. • Sveda Esperanto-Federacio, Södra Rörum pl 455, S-24294 Hörby.

Svisa: Christoph Scheidegger, Im Schleadorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel.

Usona: ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. R: elna@esperanto-usa.org

Venezuela: Peter Jaimez, Apartado 3482, Caracas 1010A, Venezuelo. R: peterjaimez@tutopia.com



aŭ rekte al la eldonejo

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, Belgio


Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

- 2.2. Sendu al ni ordinaran bankĉekon el via lando, eŭroj, tratitan je belga banko. Se la bankĉeko ne estas tratita je belga banko, aŭ se ĝi estas en alia valuto ol EUR, aldonu la egalvaloron de 10,5 EUR.
- 2.3. Petu vian bankon pagi al KBC Antwerpen Belgio, SWIFT-kodo "KREDBEBB", por konto 402-5510531-55.
- 2.4. Sendu al ni internaciajn respondkuponojn. Ili estas akireblaj en la plimulto de la poŝtoŝecoj de la mondo. Unu kupono, nur maldekstre stampita de la poŝtoŝejo, aŭ tute ne stampita, valoras 0,79 EUR.

3. Rimedoj kiuj kostas en la alvenlando:

- 3.1. Se vi posedas kreditkarton Eurocard, Visa, Access, Fujicard aŭ Mastercard, eblas pagi citante la numeron kaj la validodaton de la karto. Tiuj kiuj volas uzi PGP-ĉifradon por sendi la donitaĵojn, povas peti la publikan ŝlosilon de FEL per simpla retpoŝto. De pagoj per kreditkarto subtrahiĝos 0,62 EUR + 2,25% pro administraj kostoj.
- 3.3. Se vi havas poŝtĉekkonton, vi povas pagi al konto n-ro BE66 0000 2653 3843 de Flandra Esperanto-Ligo. Aldonu al la sumo 1,50 EUR aŭ egalvaloron pro la bankkostoj.

Por limigi la bankkostojn, vi povas pagi pli altan sumon. La tro pagita mono eniros konton vian, pri kiu vi povas disponi por estontaj mendoj.




Estimataj gelegantoj,

Kun kiom da esperoj ni eniris la unuan jaron de l' nova jarmilo, sed nun, ĉe ties fino, ni malĝoje devas konstati, ke ĝi en grandaj partoj de l' mondo tute ne estis bona, eĉ male, ni devis sperti aron da problemoj, obstakloj, regresoj kaj katastrofoj. En preskaŭ neniuj el la kutimaj krizaj regionoj malaperis la konfliktoj aŭ militoj, parte ili eĉ akriĝis kiel en Palestino. Dum la lastaj monatoj de tiu ĉi pasanta jaro la mondon skuegis terorismo antaŭe ne imagebla, kiam fanatikuloj murdis milojn da homoj en Usono per metodoj terure kruelaj. Paralizitaj pro tia abomenaĵo ni angoris: ĉu sekve ni suferos trian mondmiliton? Bonŝance tio ne okazis, sed la sekvoj de la atencoj de septembro estas ankaŭ sen tia ekstrema eksplodo teruregaj, sen pozitiva perspektivo. Ni devas vivi plue sen sento de sekureco, pli ĝuste: neniuj el ni scias, kiam kaj kie okazos nova terorista kruelaĵo, kies viktimo povus esti ĉiu el ni. Krome, pro pli striktaj leĝoj jam nun en multaj landoj homoj suferas severajn limigojn de rajtoj kaj liberecoj. En tiu ĉi streĉa situacio ankaŭ ne tro multe konsolas, ke fine de la jaro almenaŭ en Nord-Irlando reaperis espero pri paciĝo kaj ke teroristoj de la eŭska ETA iomete reduktis murdadon. Sed cetere, kion atendi kaj esperi pri la nova jaro? La kutimaj prognozoj valoras nenion, kaj profeto estas neniuj el ni. Mi povas nur deziri al ĉiu unuopa el vi, ke vi fartos bone. Sed mi konfesas, ke estas malfacile esti optimisto pri la plua evoluo de tiu ĉi jarmilo.

Sincere via Stefan MAUL

leteroj	4
el mia ridpunkto	5
- Dumil unu	
politiko	6
- NORD-IRLANDO: Paco – floro ankoraŭ fragila ▶	
- LITOVIO: Ĉu sana, ĉu malsana?	
- NORVEGIO: - Tero kaj akvo	
- Nova registaro	
ekonomio	8
- EŬROPA UNIO: Eŭropaj negocoj en Mastro	
- LITOVIO: - Entreprenistoj interesiĝas pri prizonoj	
- Sociologoj avertas	
moderna vivo	10
- JAPANIO: Malkaraj kostoj, malkaraj homoj	
- EŬROPA UNIO: Kiom valoras „aliaj lingvoj“?	
- NORD-IRLANDO: Malsolida solidareco	
- AŬSTRIO: Ok milionoj plus ...	
- CIGANOJ: Ne estas malbonaj popoloj ...	
- BENINO: Ĉu-vi-vidas-min-ismo	
- LITOVIO: Plonĝe enamiĝintaj ...	
lingvo	13
- LINGVO POR SURDULOJ: Je defendo de liplegado ▶	
medio	15
- AŬTOJ: Ĉu ekologiaj aŭtoj el Litovio?	
- BRAZILO: Batalhundoj	
turismo	16
- ARGENTINO - ĈILIO: Tra la Andoj boate (Kovrilo)	
eseo	18
- ESPLORADO: Enkonduko al senpena kaj malmultekosta okupo historia ▶	
arto	20
- USONO: Kiel pentri demokration? ▶	
- KALININGRAD: Kion kaŝas la Kvendan-fortikaĵo?	
- DISKOJ: Vera Esperanta muziko	
novelo	23
- de Julian Modest: La ikono	
libroj	26
informoj de l' MONATO	29
ŝerco & satiro	30



Terorismo (5)

Mito, kiu forfumiĝis la 11an de septembro, rilatis al la nevenkeblo de „la ekstrem-potenco”, priskribita antaŭ tiu dato de Stefan Maul (MONATO, 2000/9, p. 5). Senpripense George W. Bush deklaris militon kontraŭ terorismo. Parlamentanoj kaj senatanoj kuniĝis poste, galvanizite de freneza serĉo pri la fifarintoj de ĉi tiu horora krimo. Ŝanceliĝinte de la komenca ŝoko tamen, kaj dum la polvo surfundiĝis, George W. Bush ŝajne konsciĝis, ke elserĉi kanajlojn el ĉi tia grandega mondo, plena de tiomaj kaŝejoj, postulos tutmondan kunlaboron. Li devos varbi subtenon de la multaj ŝtatoj, kiujn li ripete estis kontraŭinta pro sia impertinenta malatento de internaciaj traktatoj kaj de respondeco pri la gravegaj, longtempaj bezonoj de la tutmonda komunumo. Traktado pri terorismo, mediaj kataklismoj kaj milito devos esti kunordigita fortostreĉado. Kaj nenia tutmonda regado estos defendebla, kiu permesos al sia direktoro samtempe esti la persekutisto de krimaj akuzitoj, ilia ĵuriano kaj ilia juĝisto sen kontroloj kaj kontraŭpezoj. La bezono por la Internacia Krimkortumo denove demonstriĝas kiel neniam antaŭe.

Betty REFIOR, Usono

Hontinda vizito

Koncerne la artikolon „Hontinda vizito” (MONATO, 2001/9, p.13), mi volas esplori historian fakton. La aŭtoro kritikas la viziton de ĉefministro Koizumi al la ŝintoisma templo Yasukuni. La templo, kiel li ĝuste mencias, apoteozas soldatojn kaj militservantojn, kiuj mortis por sia patrujo. Estis apoteozitaj ĉ. 2,5 milionoj da militpereinetoj ene de modernaj militoj (inkluzive la duan mondmiliton) de Japanio, sed ne milionoj da civilaj militviktimoj dum la milito. Japanio senkondiĉe kapitulacis je la aliancanoj la 15an de aŭgusto 1945. Tiun daton oni ceremonias ĉiujare por memori la militpereinetojn (inkluzive de soldatoj kaj civiluloj) aŭ en la templo Yasukuni aŭ aliloke. Ĉefministro Koizumi deklaris, ke li vizitos ĉi-jare la templon la 15an de aŭgusto. Kadre de ŝtormoj da kondamno enlanda (el maldekstrula angulo) kaj eksterlanda (ĉefe el Ĉinio) kontraŭ la vizito, li tamen devis ŝanĝi la vizittagon al la 13a de aŭgusto. Ĝenerale videblas alilande la vizitoj de prezidantoj aŭ ĉefministroj al propraj naciaj tombejoj aŭ similaj lokoj, kie pereintaj soldatoj eterne dormas. Kvan-

kam Yasukuni ne estas tombejo, ĝi kompareblas kun ekz. Arlington de Usono. Ne kompreneblas kritikoj kontraŭ la vizito de ĉefministro al la templo. La aŭtoro duonĝuste asertas, ke la vizito de la ĉefministro al Yasukuni klare atencas la japanan konstitucion, kiu apartigas politikon kaj religion. Jes, li pravas, sed duone, ĉar li neniom mencias la novjaran viziton de ĉefministroj kaj aliaj al la ŝintoisma templo Ise, kie estas apoteozita la prapatro (aŭ prapatrino) de la Imperiestro. Duobla normo! Plue, la aŭtoro diras, ke „en Yasukuni estis sekrete apoteozitaj gravaj militkrimuloj”. Ne ekzistas termino „gravaj militkrimuloj”, sed „klaso-A militkrimuloj”, kiuj tamen estis tiaj etikeditaj en Tokia Tribunalo (ekvivalenta je Numburga Tribunalo), kaj tiu Tokia Tribunalo mem verdiktis maljuste kaj kvazaŭ-linĉe baze de post-afera juro. La siatempaj usonaj gvidantoj ne estis juĝitaj nek kondamnitaj pro la masakro de kelkcentoj da miloj da senkulpaj civiluloj en Hiroŝima, Nagasaki kaj Tokio. Kial? Kaj la aŭtoro konkludas, ke mortis en aziaj landoj 20 milionoj da homoj; falis „nur” 3,5 milionoj da japanoj, kaj ke simple kalkulite, unu japana soldato mortigis po preskaŭ 6 homojn. Ĉu tiuj 20 milionoj da azianoj estis ĉiuj mortigitaj de Japana Imperia Armeo? Kaj ĉu tiuj militfalintaj 3,5 milionoj da japanoj ĉiuj estis soldatoj? Aŭtentike, du trionoj de tiuj 3,5 milionoj da pereintaj japanoj estis civiluloj. Trompas la eldiro „unu japana soldato mortigis po preskaŭ 6 homojn”. Tiu ĉi kontribu-aĵo estas hontinda.

IGARASI Takeo, Japanio

Oktobra Monato

Min atingis la oktobra numero de MONATO. Mi deziras speciale noti la trafan analizon, kiun faris Stefan Maul en la artikolo „Murdi je nomo de dio” (MONATO 10/2001, p. 5). Tiaĵon ne eblas legi en usonaj amaskomunikiloj pro ilia politika ĝusteco: oni ne deziras krei tensiojn kun enlandaj islamanoj; kaj oni ne deziras fari damaĝon al la fragila multlanda kontraŭterorisma koalicio.

Boris KOLKER, Usono

Papera malŝparo

Rilate al la artikolo de Mu Binghua (MONATO, 2001/9 p. 10): Mi tre interesiĝis kaj akordiĝis kun lia sinteno. Mi havas 80 jarojn kaj spertis kiel, ĉe ni, la bolitaj sukeraĵoj, biskvitoj, ktp. ofte estis sen volvaĵoj kaj liveritaj al aĉetantoj en simplaj papersakoj, kiam mi

estis infano. Nun ĉio estas pakumita, ofte kelkfoje! Oni devas esti vere lerta por rompi la sigelitajn skatolojn aŭ plastajn sakojn.

Alia kaŭzo de malŝparo estas la ĵurnaloj. Kiel junulo mi miris je rakontoj pri la ĵurnaloj en Usono, kiuj pezis eĉ kilogramon. Nun ankaŭ ni havas tiajn. Dum la jaroj ankaŭ bonfaraj fondusoj aliĝis la arojn de malŝparantoj de papero, ktp. Foje ili almozpmetis nur unu-dufoje jare per simpla letero. Nun ili skribas eĉ monate kaj sendas informojn kolorpresitajn sur luksa papero. Kelkaj fondusoj splitiĝis, do oni ricevas du almozpetojn anstataŭ unu. Nerespondado tute ne haltigas la fluadon de pli kaj pli da papero ne-dezirata, kaj oni detruadas arbaregojn por satigi la bezonojn de la malŝparantoj.

Henry PALMER, Britio

Reago al Raita Pyhälä

En sia letero aperinta sub la titolo Terorismo kaj senkulpeco (MONATO, oktobro 2001, p. 4), Raita P. volas nin kredigi, ke la teroristoj, kiuj detruis la Mondkomercan Centron en Novjorko la 11an de septembro 2001, estis iaspekaj „Robin Hood-oj”, kiuj brave agis por alporti juston al la mondo de la senhavuloj. Jen mistordita rezonado kaj eĉ pli granda trosimpligo ol tiu pri kiu RP mokas la Bush-an reagon. Ni rekonu la teroristojn kiaj ili estas: murdemaj, malhomaj, kaj, jes ja, ofte mem sufiĉe riĉaj. Sed samtempe ni memoru, ke Islamo ne egalas terorismom kiel Stefan Maul erare kredigis en sia samnumera vidpunkto (p. 5).

Pri unu afero RP tamen tute pravas, nome ke la ununura rimedo kontraŭ similaĵoj estas edukado al paco, dialogo inter kulturoj kaj egalrajteco. Tiun rimedon la teroristoj sukcesis pushi eĉ pli foren en la estontecon kaj mortados multege da senkulpuloj, en Afganistano kaj aliloke, antaŭ ol ghi realiĝos. Jen la daŭra tragedio.

Bruce CRISP, Kanado

Pri la enhavo de leteroj respondecas la aŭtoroj mem. La redakcio havas la rajton mallongigi leterojn. Reagoj al artikoloj ricevas prioritaton.

Skribu al:

**FLANDRA ESPERANTO-LIGO
MONATO (Leteroj)
Frankrijklei 140
B-2000 Antwerpen
Belgio**

Retadreso:

monato-leteroj@fel.esperanto.be

Dumil unu

Kiu kredis pasie, ke pasis la postkomunisma ondo de ŝtafondo, funde eraris, ĉar ĉi-jare naskiĝis spektakle kaj mirakle unika kunikloŝtato: Esperanta Civito. Herolodoj komunikis tutmonde, ke jam dekoj da establoj stapliĝis en la nova kom(ik)unumo kun propraj flago, parlamento, polico, ŝ(t)atreligio ŝaumismo kaj karcerkliniko (ne KANCERKLINIKO! - laŭ ties ridpunkto la civito estas „blago”, sed kion ja atendi de gazeto subnivela, t. e. sub la nivelo de LITERATURA FOIRO, centra placo de Esperanta Civito). La nova nanoŝtato nomiĝas tiel, ĉar ĝi estas esperanta, ke ĝi glate glite glutos kiel kolbason la kolosan ekstrempotencon USA - ho, pardonu: UEA. Sole la grimaca minaco jam sufiĉis, por ke amase fuĝu oficistoj el ties Blanka Domo en Rotervarmo, tiel nomata Ovola Oficejo ... La nova UEA-prezidanto Renegato Korseto devas strikte ligi sian korseton por alfronti tiun rikanan ĉikanon.


Aĉetu ŝtatestron!

Sed ni ne forgesu aliajn amuzajn fameventojn de 2001. Ekzemple la novan modon vendi eksmodajn ŝtatestrojn. Tiun ĉi metodon por kapti kapitalon unue aplikis Jugoslavio, kiu vendis sian a(r)matan Miloŝeviĉon kontraŭ kelkaj milionoj al Usono kaj Eŭropa Unio - vere modera prezo, se ni konsideras koston de l' tiama BATO-milito kontraŭ li. La kompatinda kompartiano nun estas kuracata en karcerkliniko en Nederlando, proksime de menciita UEA-sidejo. Jam oni marĉandas pri aliaj mendoj kaj vendoj. Perla kandidato estas itala belkanta Berluscono, kiu scias, ke flama islamo estas subnivela kompare al kristala kristanismo; sed la kopruptfakulo subaĉetis venĝemvendemulojn. Fermanaj kristandemokratoj provas vendi sian ekskancelieron, kolosan Kohl, sed tiu facile povus aĉeti sin mem per mono el siaj nigraj kaso. Fiaskis ankaŭ Peruo, kiu volis makleri sian makulan prezidanton al Japanio, sed Fuĝimoro forfuĝis memage senpage al sia hejmlando.

Frenezo furoras

Kiel oni vidas, tutmondiĝo funkcias, kion pruvis ankaŭ la G-8-pinto en vitala itala Ĝenovo, kie frenezaj policianoj kaj aliaj ŝtathuliganoj torturis homojn, kiuj ame kaj amase protestis kontraŭ

tutmondiĝa frenezo. La (v)italaj taŭroj probable estis infektitaj de bovofrenezo, kiu ĉi-jare tutmondiĝis. Ĝi eliris el la klasika lando de frenez-ajoj, Britio (nun britoj hejtas per brutoj), kaj tuj invadis Eŭropon kontinentan. Kia kontento, kiam Germanio fiermanie jam en somero povis komuni-ki, ke ĝi havas la centan b(i)enon kun bovofrenezo. Por kompletigi tutmondiĝan frenezon, tuj sekvis alia brutala brutmalsano; Akademio de E. ĝojis freneze diskutadi, ĉu la ĝusta nomo estas „buŝhufa” aŭ „hufbuŝa” malsano. Salutinda kromefiko de tia tutmondiĝo estas, ke homoj fariĝis manĝokonsciaj: unue ili evitis bovaĵon, poste porkaĵon, kaj transirinte al viando de kokoj kaj meleagroj vegetis vegetarane, kiam oni malko-



vris, ke la kortbirdojn bredistoj venenas per antibiotikoj. Sekvis plia tutmonda alarmo: en legomoj, fruktoj kaj grenoj sidas genoj el tekniko! Homoj transiris al tiel nomataj bioproduktoj - sed en ili malkovris vermojn. Nun tutmonde de Afriko ĝis Afganio ekis manĝostriktoj, ĝis kuraĝaj politikistoj propagandis, ke neniam antaŭe, ĝuste pro bovofrenezo kaj buŝhufa epidemio, oni tiom severe kontrolis viandon. Do homoj ĝoje aĉetis denove bovan kaj porkan viandon, ktp. Tion oni nomas „tutmondiĝa ciklo” de valoj kaj ondoj; ni trankvile povis atendi la venontan ondon de frenezo.

Usona = bona

Ĝi alvenis la fifaman 11an de septembro, kiam ĉio kaj ĉiuj freneziĝis. Falegis ne nur du kapitalismaj turoj sed terure ankaŭ akcioj, borsoj preskaŭ kolapsis, novekonomio iĝis malnova, mastroj amase maldungis homojn pro terorismo. Dum tiu ĉi patosa etoso oni kredis tian hipokritecon kaj ignoris, ke (ekzemple) telekomunika kompanio Siemens ĉiel ajn telepelus milojn da laboristoj, ĉar vendado de poŝtelefonoj stagnas jam delonge. Sed post la 11a laŭ nova flugila vorto ĉio estas alia, nur Usono restas sama. Demandite kial la mondo islama misamas Usonon, prezidanto Buŝo elbuŝigis, ke li ne komprenas, ĉar: „Ni ja estas bonaj.” Tial do usonigado de l' mondo (=tumondiĝo) kontentige kontinuas, tial en Talibanio falis usonaj bomboj kaj bonbonoj ternuksbuteraj kaj afganoj kiel ĉiuj mondanoj nun jubilas: „Ĉar usona, tial bona!” Ĉion usonbonan por la nova jaro!

Stefan MAUL

NORD-IRLANDO

Paco – floro ankoraŭ fragila

Regis granda eŭforio en la Irlanda Respubliko pro la aŭtuna anonco pri malarmado en Nord-Irlando.

Laŭ la internacia komisiito pri malarmado, la kanada generalo Chastelain, la armita respublikisma organizaĵo Irlanda Respublikisma Armeo (IRA) finfine „metis konsiderindan kvanton de siaj armiloj ekster uzo”. La ĵus ekŝiĝinta ĉefministro de la nordirlanda asembleo kaj gvidanto de la porbrita Uniista Partio, David Trimble [deĵvid trimbal], tuj decidis retiri sian decidon ekŝiĝi.

La plimulto de la uniistoj kaj tiel nomataj lojalistoj rifuzis kredi asertojn pri malarmado fare kaj de respublikistoj kaj de la generalo. Ili atentigis, ke neniu klarigis, kiom da armiloj estas forigitaj, kaj ĉu tiuj estas fakte detru-

inetojn survoje al la lernejo Sankta Kruco en Belfasto.

Krome aliaj organizaĵoj ne malarmis sin. Do la situacio estas ankoraŭ tre malcerta kaj la relativa „paco” en la regiono restas floro fragila.

Garbhan MACAOIDH




Generalo Chastelain (supre) kaj David Trimble kredas, aŭ esperas, pri finfina paco.



itaj. Plie ili demandis, kial la publiko ne spektis almenaŭ vidbendon aŭ filmon pri la malarmado.

Intertempe, dum ne plu okazas gravaj atencoj en Nord-Irlando, individuoj el ambaŭ komunumoj estas murditaj aŭ vunditaj (unu el la murdoj tamen rilatis ne al politiko sed al narkotaĵo-ŝakrado), domoj estas atakitaj per tubbomboj kaj fajroboteloj, kaj plenkreskuloj ankoraŭ timigas knab-



Ĉefministro Algirdas Brazauskas: ĉu kapabla plenumi sian oficon aŭ ne?

LITOVIO

Ĉu sana, ĉu malsana?

Konsternis parlamentanojn la sanstato de la litova ĉefministro Algirdas Brazauskas. Dum parlamenta parolado Brazauskas komencis sencele babili: „Kelkfoje li parolis pri la samo, kaj li ne povis prezenti klarajn respondojn,” notis liberala deputito. Tamen defendis sian 69-jaraĝan ĉefon socialdemokratoj, dirante, ke kulpas laborstreĉo kaj la grandaj ŝarĝoj de la ĉefministra ofico.

Sed poste televidaj spektantoj rimarkis, kiel Brazauskas miksis diversajn nociojn. Regis plia malkontento, kiam la ĉefministro, dum renkontiĝo kun eksterlandaj investantoj, longe parolis pri la atingoj de socialismo, kiam Brazauskas estris la litovan komunistan partion.

La ĉefministro forte neis, ke lia sanstato maltrankviligas: „Tiuĵ, kiuj dubas pri mia sanstato, veturu al malsanulejo kaj kontrolu,” li diris. Neniu leĝo postulas, ke ŝtatestro prezentu atestilojn pri sia fizika kaj mensa stato. Tamen la ŝtatprezidanto de Litovio, Valdas Adamkus, proprainciate informas la litovojn pri sia sanstato. Certe la ĉefministro ne intencas sammaniere agi. LAST

Tero kaj akvo

Prezidanto de la samea parlamento en Norvegio restas Sven-Roald Nystø. Lia partio „Regna ligo de norvegaj sameoj” (fakte kulturorganizaĵo, kiu partoprenas la balotojn) kune kun tri reprezentantoj de la Centra Partio kaj du de lokaj sameaj listoj havas plimulton en la novelektita parlamento.

Sameoj estas indiĝena popolo de nordaj Norvegio, Svedio, Finnlando kaj Rusio. Nuntempe la plej multaj sameoj vivas pli-malpli same kiel siaj alinaciaj samlandanoj. Kredeble ekzistas ĉ. 40 000 sameoj, el kiuj 25 000 en Norvegio.

La samea parlamento parte konsilas pri aferoj rilatantaj al sameaj intereso, parte mem disponas buĝeton por subteni kulturajn projektojn. La parlamento helpis prestiĝigi sameojn en Norvegio, kaj multaj, kiuj kaŝis sian parte samean devenon, nun deklaras sin tiaj. Kelkaj sameoj tamen plendas, ke la parlamento ne sufiĉe influas la nacian norvegan politikon.

Plej grava temo en la venontaj kvar jaroj estos la rajto al „tero kaj



Sven-Roald Nystø restas prezidanto de la samea parlamento.

akvo” en la gubernio Finnmark. Leviĝas la demando, ĉu sameoj, aŭ kiel unuopuloj aŭ per sia parlamento, havu apartajn uzrajtojn por teraj kaj akvaj riĉaĵoj en tiu ĉi plej norda angulo de Norvegio.

Baard HEKLAND

Nova registaro

Ekoficis en Norvegio nova centra-dekstra registaro. Kjell Magne Bondevik de Kristana Popola Partio iĝis ĉefministro kaj la estro de la plej granda koalicia partio, Jan Petersen de „Dekstro” (konservativa partio), iĝis nova ministro pri eksteraj aferoj. Lia sampartiano Per-Kristian Foss okupas la gravan postenon de ministro pri financoj.

La nova registaro havas grandan defion realigi samtempe la impost-reduktojn, kiujn promesis „Dekstro”, kaj la socialajn servojn, kiujn promesis plibonigi la kristana partio. Partoprenas la registaron ankaŭ eta social-liberala partio.



Kjell Magne Bondevik (maldekstre), nova ĉefministro de Norvegio, kaj Jan Petersen, nova ministro pri eksterlandaj aferoj.

Baard HEKLAND

Monato

KONEKTIĜI

- ▶▶ **KOLOFONO**
La bazaj informoj pri MONATO.
- ▶▶ **SPECIMENOJ**
Specimenaj tekstoj el MONATO.
- ▶▶ **TARIFO**
Kotizoj de MONATO en la diversaj landoj.
- ▶▶ **PERANTOJ**
Perantoj de MONATO al kiuj vi povas pagi vian kotizon.
- ▶▶ **ABONILO**
Se vi ankoraŭ ne estas abonanto de MONATO, aŭ se vi simple volas plilongigi vian abonon, uzu tiun ĉi praktikan abonilon!
- ▶▶ **REDAKTOROJ**
Redaktoroj de MONATO al kiuj vi sendu viajn manuskriptojn.
- ▶▶ **MANUSKRIPTOJ**
Kiel sendi viajn manuskriptojn al la redaktoroj de MONATO.
- ▶▶ **KONVENCIOJ**
Lingvaj kaj ortografiaj konvencioj de MONATO.
- ▶▶ **ANONCOJ**
Anonctarifoj de MONATO.
- ▶▶ **INDEKSOJ**
Indeksoj de MONATO por trovi aperintajn artikolojn.
- ▶▶ **RADIO POLONIA**
Mencioj kaj recenzoj pri MONATO en Radio Polonia.
- ▶▶ **ETIKO**
Etika kodo de ĵurnalismaj principoj (agnoskita de MONATO).

24 HOROJ

TTT: <http://monato.esperanto.be>

EŬROPA UNIO

Eŭropaj negocoj en Mastroiĥto

Pasintan junion mia ministrejo igis min partopreni en dulingva, tutsemajna seminario por lerni kiel bone negoci „bruselajn” aferojn. La seminario okazis en tre oficialaspekta Eŭropa Instituto pri Publika Administrado (www.eipa.nl) en Mastroiĥto, Nederlando. Miaj travivaĵoj rememorigis al mi la artikolon pri ŝmirmono kiu aperis en **MONATO** de februaro 2000.

Oni donis al ni dosieron pri iu negoco kaj ni „gajnis” landon kun instrukcioj, sekretaj instrukcioj, eta flago, ŝildeto kun nomo de la lando en ties lingvo kaj eĉ novan sidlokon laŭ la oficiala plano de la tablo. Poste ni dum du ĝis tri horoj cerbumis pri papera preparado. Ankaŭ enestis devigaj koridoraj negocetoj. Du eŭropaj oficistoj teatrumis intertraktadojn pri komunikado, poluado, nuklea alarmo, ktp.

Estis malfacila, laciga tasko ĉar ĉiuj provis enhaŭtumi veran negociston, kompreni la problemojn de la nova lando kaj bone imiti la ludadon.

Ekzerco

Iun tagon ni ricevis komercan ekzercon. Temis pri firmao *Eurest* kiu volas aĉeti rapidrestoracion *Lechoux de Bruxelles* (franca vortludo malfacile tradukebla). La aĉetanto ne rajtis pagi pli ol 300 000 eŭrojn. Ni laboris en grupetoj de po unu aĉetanto kaj vendanto. Mi elektis esti aĉetisto; kiel sinjoro Lechoux rolis itala komercisto.

Mi bone negocadis. Mia partnero konsentis vendi sian firmaon por 300 000 eŭroj. Estante sindikatulo, mi skribe akceptis redungi ĉiujn liajn gelaboristojn. Iomete mi fieris pri mi mem! Sed alvenis la tempo de la korektado de la ekzerco ...

La aĉetanto de la unua grupeto (du nord-eŭropanoj) raportis: „Mi aĉetis la firmaon por 350 000 eŭroj, sed mi ankaŭ aĉetis belan velŝipon por sinjoro Lechoux.”

La dua grupeto (anglalingvanoj): „Mi malfacile akiris la firmaon por 450 000 eŭroj, proponinte senpagan ĉirkaŭmondan vojaĝon al gesinjoro Lechoux”.

La tria: „Ni ne interkonsentis... Tro multekosta afero!”

La kvara: „Sinjoro Lechoux estis tiel



En Mastroiĥto oni instruas: „Gravas venki, ne gravas la rimedoj”.

kontenta ĉar mi proponis al li trimonatan restadon en granda hotelo apud la varma suda maro kun lia amantino (sen diri tion al sinjorino Lechoux), ke li konsentis por 400 000 eŭroj!”

Simplulo miskomprenis

Post la prezentado mi levis la fingron por peti la parolon: „Ĉu mi bone komprenas, ke kelkaj aĉetantoj proponis tion, kion france oni nomas *misuzo de socialaj posedaĵoj*?” Mi atendis la finon de la interpretado: neniam reagoj! Por skui la ŝafaron, mi reparolis: „Mi pensas ke ni povas paroli pri *koruptado*.” Neniu brovo ekmovetis. Ĉiuj serioze rigardis plafonon.

La pedagogoj ekparolis denove. „Vi grave eraras pri negocado. Gravas venki, ne gravas la rimedoj.” Estis mia vico por esti senvoĉa. Mi hontegis esti

tiel idiota. Mia persona mondo, en tiu templo de eŭropismo, disfalis: koruptado estas do normala afero. Cetere, mi aŭdis neniun rimarkon pri la pagitaj prezoj, konsiderinde pli altaj ol antaŭvidite.

Konsolaj vortoj

Por flegi mian ĝenegon, dum kafaŭzo instruisto venis paroli kun mi. „Mi bone komprenas ke mi iomete ŝokis vin, sed estas normala funkciado en komerca negocado. Ĉefa afero estas bone kompreni la kontraŭulon, do sin montri agrabla por li...”

Tiam, pro persona profesia sperto kun vendistoj de informadikaj servoj kaj konsiloj, mi pensis: „Ofte en luksa restoracio, helpe de multekosta vino kaj juna asistantino kun granda buŝrideto, mallonga jupo kaj profunda dekolto...”

Li daŭrigis: „La plej bona ilo por tio estas donaceto aŭ eĉ ŝmirmono laŭ la grandeco de la afero. Kompreneble, la prezo de la plezuraĵo donota ne devas superi la profiton.” Li mallaŭtigis voĉon: „Ankaŭ en la oficiala eŭropa sistemo, sed tio estas malpli ofta... Rigardu ĉi tie viajn kolegojn kiuj laboras en eŭropaj oficejoj. Kiam vi parolis, neniu ŝokiĝis. Pardonu min, sed eble vi estas tro naiva ŝtata oficisto.”

Reala historio

Pli poste, dum la manĝo, la gvidisto denove parolis kun mi. „Eble mi ŝokis vin, sed lasu min rakonti pri vera traktado eŭropa.” Jen lia rakonto (mi ellasis la landnomojn kaj detalojn):

„Iam dum negoco pri fiŝkaptado (pri la grandeco de la retaj truoj aŭ io tia, ne gravas), iu lando A volis rifuzi, sed por lando B estis grava ekonomia afero. La postan tagon negocisto el B invitis sian amikon el A en restoracio (en Bruselo ĉiuj sin konas kaj tre ofte amikiĝas). Dum la digesta alkoholo li diris, ke li havas grandan domon apud la maro kaj invitis la A-anon veni por ferii ĉe li. La A-ano post iom da babilado fine konsentis kaj dum posta negocado pli fleksis sian pozicion. Do, somere la A-ano kun edzino alvenis ĉe la B-a kolego. Pro familia kialo tiu ne mem povis gastigi, sed li faris aranĝon kun najbara hotelo. Pasis paradiza monato, tute senpage... Ĉe la fino de restado la A-ano ankoraŭ demandis al la hotela direktoro ĉu vere li ne devas pagi ion, ĉu aperitivojn, ĉu vinojn, ĉu kafojn? 'Absolute nenion' respondis afable la direktoro.”

Mia profesoro aldonis: „Mi rakontas al vi la anekdoton plej direblan por viaj naivaj oreloj...”

Konkludo

Cerbumante en la trajno, kiu rehejmigis min en mian francan provincurbeton, mi kontemplis, tra mia bela diplomo de eŭropa negocisto, la fumantan ruinon de mia universo. La televidaĉa serio *X files* diras „la vero estas aliloke”. Por mi nun „honesteco estas aliloke”.

Reale ne gravas ĉar mi okupiĝas pri neniuj eŭropaj aferoj. Oni sendis min al la mita eŭropa urbo por plibonigi mian personan kulturecon. Kaj Mastriĥto estas belega urbo.

AMIĈJO

Noto de la red.: La aŭtoro petis uzi pseŭdonimon, ĉar lia ministrejo eble ne ŝatos la raporton.

LITOVIO

Entreprenistoj interesiĝas pri prizonoj

La prizonoj de la litova ĉefurbo Vilnius fariĝis allogaj objektoj por eksterlandaj investantoj. Britoj en la izolejo-prizono de Lukiskes volas organizi modernan distran centron. En striktregima punlaborejo la francoj deziras malfermi internacian instituton kun studenta urbeto.

Britaj entreprenistoj jam komencis interparolojn kun la ministrejo pri juro por akiri komplekson de ejoj en malnova urboparto, kie funkcias la prizono de Lukiskes. Rekompence ili pretas konstrui novan prizanon ie en la antaŭurbo de Vilnius.

La nunan prizanon oni komencis konstrui en la dua duono de la 19a jarcento. Kelkaj el la konstruaĵoj havas arkitekturan valoron. La novaj posedantoj prizonkamborojn rekonstruus por tie establi komfortajn apartamentojn, kaj fermitajn prizonkortojn ili reorganizus al imponaj vintraj ĝardenoj. Se vere okazus tiel, Lukiskes fariĝus la plej granda tiuspeca komplekso en Eŭropo.

Litovdevena entreprenisto el Francio, Jean Malinauskas, revas pri moderna instituto anstataŭ striktregima punlaborejo. La kolonio nun funkcias

en vasta iama monaĥejo, kie, laŭ opinio de la entreprenisto, povus enlokiĝi eĉ studenta urbeto.

Dum eksterlandaj entreprenistoj pentras siajn viziojn, litovaj aŭtoritatuloj reagis prudente, i.a. ĉar la tuta reorganizado kostus multe da mono, kiu ĉiam mankas. Tamen, en la mondo pluraj hoteloj instaliĝas en iamaj prizonoj, ekzemple *Löwengraben* en Lucerno (Svislando) kaj *Breakwater Lodge* en Kaburbo (Sud-Afriko). Ankaŭ la istanbula *Four Seasons* pri sia deveno iel silentas.

LAST



La prizono de Lukiskes britaj entreprenistoj jam imagas kiel modernan distran centron.

Sociologoj avertas

Post aliĝo al Eŭropa Unio (EU) Litovio perdos ĝis 300 000 loĝantojn. Tiajn anticipajn prognozojn prezentis litovaj sociologoj kaj spertuloj de EU.

Esplorado montras, ke dum tri estontaj jaroj vivi eksterlande planas ĉ. 2 % de la loĝantoj. Konsiderante ke ili forveturus kun siaj familioj, oni povas kalkuli ĉirkaŭ 300 000 personojn. Tio signifas, ke Litovio perdos la plej laboreman socitavolon. „Migrado influos ne nur apartajn fakojn, sed ankaŭ la tutan ekonomion de la lando”, avertas sociologoj.

Danĝeran influon al la labormerkato antaŭtimas ankaŭ najbaraj EU-landoj. Tamen altpostenuloj de EU trankviligas, ke tiu influo ne estos granda. Sian decidon pri forigo de sepjara transira periodo kaj malfermo de sia labora merkato, post kiam Litovio aliĝos al EU, jam oficiale deklaris Danlando, Irlando kaj Nederlando. Neoficiale oni asertas, ke samon baldaŭ faros ankaŭ Svedio kaj Italio.

LAST

JAPANIO

Malkaraj kostoj, malkaraj homoj

Antaŭ kelkaj jaroj, kiam en Japanio abundis mono, oni preferis la plej altan prezon. Ekzemple, se elekteblis inter du similaj varoj, oni aĉetis la multekostan. Japanio estis tiam fikonata pro altaj prezoj. Tamen ne plu: okazis en Japanio prezrevolucio.

En Japanio cirkulas ses moneroj, tiuj kun valoro de 1, 5, 10, 50, 100 kaj 500 enoj. Nenion oni povas aĉeti kontraŭ 1 aŭ 5 enoj: per tiuj moneroj oni pagas konsumimposton (5%). Kontraŭ 10 enoj oni povas telefoni tri minutojn; kontraŭ 50 sendi enlande poŝtkarton, kontraŭ 70 eksterlanden; kaj kontraŭ 120 enoj oni povas aĉeti skatolon da suko.

Aperis antaŭ dek jaroj 100-enaj vendejoj, kie oni povas aĉeti ĉion kontraŭ 100 enoj. Komence oni ne tre ŝatis tiajn vendejojn, ĉar japanoj tro kutimiĝis al multekosteco: oni kredis „ju pli malmultekosta, des pli malaltkvalita”. Tamen dum longa ekonomia stagnado oni ekpensas „ju pli malmultekosta, des pli bona”. Tial nun furoras la 100-enaj vendejoj en Japanio.

Solevivantoj

Generale vendejoj tiaj traktas necesajn, sed nove aperis 100-ena freŝaĵovendejo, kie haveblas legomoj, fiŝoj kaj viando. En vendejo en Otaru, Hokkaido, la respondeculo diras: „Ni vendas po kvin fragojn kontraŭ 100 enoj, po du bananaĵojn kontraŭ 100 enoj, k.s. Pro taŭga kvanto kaj malmultekosto solevivantoj kaj maljunuloj ŝatas viziti mian vendejon.” Nun, pro la sukceso de tiaj vendejoj, granda superbazaro Daiei instalas ĉe siaj filioj angulon „Vivo de 88”, kie vendeblas memproduktitaj manĝaĵoj, kukoj kaj kosmetikaĵoj kontraŭ 88 enoj.

Alia batalejo por disrompi prezojn koncernas rapid-manĝaĵojn. La ĉeno McDonald's malaltigis la koston de hamburgero de 130 enoj ĝis 65 enoj: danke al tio la vendkvanto de burgeroj saltis tage al 1,1 milionoj kompare kun 250 000 antaŭ unu jaro. Ankaŭ alia populara rapidmanĝaĵo nomata *gyuudon* (tasego da bovaĵo aŭ rizo kun kuirita bovaĵo) fariĝis malplikosta: ĉe ĉeno Matuya tasego kostis 290 enojn anstataŭ la antaŭajn 400. Ĉe ĉeno Yosinoja, kie finfine tasego kostis 250 enoj, trioble kreskis vendoj. Statistike la kosto de



„Malmultekosta estas bona”: jen la nova japana devizo.

hamburgero en la japana ĉefurbo Tokio favore kompareblas kun tiu en aliaj ĉefurboj: 102 enoj en Novjorko kaj 110 en Londono (tamen nur 78 en Parizo).

Verdas kampoj

Tamen ne forgesendas, ke eblas malaltaj prezoj parte pro malbonaj laborkondiĉoj. Por profiti, rapidmanĝejo devas premi elspezon por funkciuloj sub 14,85 % de la tuta vendosumo. Alia faktoro estas importitaj manĝaĵoj (kaj aliaj

varoj): Japanio nun provas protekti siajn produktaĵojn kontraŭ malmultekostaj varoj el Ĉinio – ekz. tubfoliaj aĵoj kaj ŝitakoj (japanaj fungoj). Nuntempe Ĉinio estas kva-zaŭ japana agro: japanoj montras al ĉinoj kiel kultivi bonkvalitajn legomojn taŭgajn por japana merkato kaj rezulte grandkvante importas el Ĉinio. Sed, dum verdas kampoj en Ĉinio, estas forlasataj tiuj en Japanio.

Antaŭ la dua mondmilito japanaj gvidantoj kriis: „Azio estu unu”, celante regitan Azion per armea forto. Nun Azio ja estiĝas unu sub la revolucio de malaltaj prezoj en Japanio. Komercistoj flugas ofte eksterlanden, malofte enlande. Tamen malantaŭ la prospero de aziaj industrioj estas malprospero de japanaj, precipe lokaj industrioj. Fabrikoj malaperas kaj laboristoj perdas postenojn. Certe: ju pli regas en Japanio malaltaj prezoj, des pli estas ekspluatataj homoj.

HORI Jasuo/pg

Kiom valoras „aliaj lingvoj”?

Potencaj figuroj estas la prezidento kaj vicprezidento de la Eŭropa Komisiono – respektive Romano Prodi kaj Neil Kinnock. Al ĉi-lasto estas asignita la grava tasko reformi la sistemojn de la komisiono.

Konsidere, ke la nombro de la EU-landoj verŝajne kreskos en la venontaj jaroj de la nunaj 15 ĝis 27, evidentas la bezono organizi sin kiel eble plej aerodinamike. Kaj des pli, se la nombro de oficialaj lingvoj, nun 11, fariĝos 24, alportante minacon de burokrata paraliĝo.

Apenaŭ surprizis, do, ke lastatempa propono de s-ro Kinnock estas, ke oni estontece preparu malnetojn de ĉiuj traktatoj kaj dokumentoj nur en la lingvoj angla, franca kaj germana. Laŭ la propono, nur post definitiviĝo ili estu publikigitaj en la aliaj oficialaj lingvoj.

La ideo tamen tuj vekis kontraŭstaron fare de la franca kaj germana ministroj pri eksterlandaj aferoj, Hubert Vedrine kaj Joschka Fischer, kiuj kune protestis al prezidento Prodi pri kreskanta „unulingvismo”. Ili kredeble timas, ke tia politiko kondukos – kiu scias kiam? – al plua rafinado, per kiu ankaŭ la franca kaj germana lingvoj sekvos la vojon de la „aliaj lingvoj”. Prodi, kiu jam foje indikis preferon por la angla, defendis la prezentitajn reformojn, asertante, ke ili estas afero interna de la komisiono, kiu ne koncernas la membro-ŝtatojn.

Organika progreso

Notindas la reago de la anglalingva ĵurnalo *Weekly Telegraph* (ĉiusemajna kaj resuma eldono de la londona *The Daily Telegraph*). Fidele doninte la detalojn pri la lingvo-propono, la ĵurnalo komentis, ke la ministroj „oponas tiun prudentan iniciaton, kiu spegulas la realon de la ĉiutaga funkciado de la komisiono.” Laŭ la verkinto, „la pliiĝanta uzado de la angla lingvo en eŭropaj forumoj fontas de sube – ĝia progreso estas organika. Ni apelacias al la komisiono antaŭenpuŝi la eliminadon de plej multaj lingvoj el ĝiaj preparlaboroj; tiel la produktado de dokumentoj estos pli simpla kaj malpli kosta kaj spegulos la



Prodi kaj Kinnock devas reformi la sistemojn de la komisiono.

ĉiam pli gravan rolon de la angla kiel *lingua franca*.”

Neniu dubas la kialojn por raciigi la manieron produkti dokumentojn por reglamentoj, interkonsentoj kaj traktatoj. La kostoj de tradukado kaj interpretado atingas jam preskaŭ unu miliardon da eŭroj ĉiujare, eĉ antaŭ la aliĝo de novaj membro-ŝtatoj. Sed oni rajtas dubi, ĉu la angle-parolanta s-ro Kinnock trovis la ĝustan solvon. Johano RAPLEY

Malsolida solidareco

Kiel multaj aliaj popoloj en Eŭropo, irlandanoj esprimis per diservoj kaj nacia funebro-tago sian simpatian por la usonanoj post la terorismaj atencoj en Novjorko kaj Vaŝingtono. En Nord-Irlando, protestantoj en kvartalo Ardoyne [ardojn], Belfasto, deklaris, ke kiel simbolo de solidareco kun Usono ili suspendos dum unu tago sian manifestacion kontraŭ la katolikaj infanoj, kiuj ĉiutage piediras laŭ „protestanta” strato al la elementa lernejo „Sankta Kruco”.

Tiu ĉi solidareco, tamen, ne estas totala, ĉar grupo de proksimume dek du homoj daŭre manifestaciis. Aliflanke la dublina ĵurnalo *Irish Times* [ajriŝ taimz] raportis, ke belfastaj protestantaj familioj plendis pri minacoj faritaj de katolikaj plenkreskuloj kontraŭ protestantaj lemejoj.

Garbhan MACAOIDH

Ok milionoj plus ...

Laŭ la plej freŝa popolnombrado vivas 8 065 166 homoj en Aŭstrio, kio estas rekordo. Kompare kun 1991 la loĝantaro kreskis je 3,5 %, tamen en grandaj urboj ĝi ŝrumpis (krom en la ĉefurbo Vieno, kie ĝi kreskis je 1,5 % al 1 562 676 homoj). La plej granda kresko – 7,5 % – registriĝis en la federacia regiono Salzburg.

Tamen naskiĝas nesufiĉe da infanoj por estigi tian kreskon, kiu rezultis plejparte de enmigrado, ĉefe el orient-eŭropaj landoj kaj Turkio. Tial laŭ prognozoj por la jaro 2030 estos la sama nombro de aktivuloj (salajro-gajnantoj) kaj pensiuloj kaj infanoj, kiuj profesie ne aktivigas. Pro tio oni jam dum la lastaj jaroj reduktis pensiojn.

Krome ekde 2002 la ŝtato finance pli subtenos infanriĉajn familiojn per tiel nomata infanmono kaj la „familia subteno”. Tamen laŭ spertoj en aliaj landoj mono ne sufiĉas por instigi al inoj naski infanojn. Ĉu tiu ĉi politiko sukcesos en Aŭstrio, montros la popolnombrado en 2011. Walter KLAG




La afiŝo de la Libereca Partio indikas, ke ekde la unua de januaro 2002 la ŝtato pagas monate por ĉiu infano 6000 ŝilingojn (436 EUR) ĝis la 36a vivomonato – sendepende de la profesio de la patrino.

CIGANOJ

Ne estas malbonaj popoloj

Per enorma tendarfajro kaj diversaj distraĵoj festis ciganoj en la plej granda parko de la litova ĉefurbo Vilnius la 500an datrevenon de sia rajto libere vagadi tra Litovio kaj elekti siajn estrojn. En Litovio ciganoj aperis meze de la 15a jarcento, kaj en 1501 estis aprobitaj iliaj privilegioj. Kutime en Litovio ciganoj okupiĝis aŭ pri terkulturado kaj forĝado aŭ ili komercis, ĝenerale per ĉevaloj. Antaŭ 20 jaroj vivis en Litovio pli ol du mil ciganoj; hodiaŭ verŝajne tri mil. Dum la festo la prezidanto de la litova cigana komunumo, Josef Tyčina, atentigis, ke



pri ciganoj homoj ofte pensas nejuste. „Ne estas malbonaj popoloj, nur malbonaj homoj.” li diris.

LAST

Kantante, dancante, ciganoj festas la datrevenon de sia liberiĝo.



LAST

BENINO

Ĉu-vi-vidas-min-ismo

Poŝtelefonoj malsatigas – almenaŭ en Benino, kie ilia uzado rapide kreskas du jarojn post la funkciigo de la unua poŝtelefona reto. Kalkulite estas, ke ĉ. 55 % de la posedantoj apenaŭ kapablas sin nutri pro la kostoj rilate ilian uzadon.

En Benino la poŝtelefono, ja praktika helpilo, fariĝis signo de socia bonfarto. Multaj uzantoj transformiĝis en montriĝemulojn: stirante, aŭtomobilistoj kaj motorciklistoj telefonas; piedirantoj vidigas siajn telefonojn enpoŝe aŭ ĉezone; kaj en publikaj lokoj longe melodias telefonoj, ĝis la telefonato finfine aŭdigas „Ha lo” kaj ĉiuj vizaĝoj estas direktataj al li.

Tiu ĉi „ĉu-vi-vidas-min-ismo” obsedas beninanojn. La sukceso de la poŝtelefona fenomeno rezultas parte de la longa atendado kaj alta kosto por aboni ordinaran telefonon kaj parte de la manko de poŝtelefonaj fakturoj. Gravas ankaŭ la sento pri sendependeco inter uzantoj de la „fama skatolo”.

Ĝis la fino de 2001 la tri privataj kompanioj, al kiuj la registaro koncesiis la ekspluatadon de la poŝtelefona merkato, atingos pli ol 500 000 abonantojn.

Christian FABOSSOU



Aušra kaj Tauras konatiĝis en naĝejo kaj geedziĝis sub akvo.

LITOVIO

Plonĝe enamiĝintaj ...

Unika geedziĝo okazis en Litovio fine de la somero: 25-jaraĝa Aušra Puriuškyte kaj 33-jaraĝa Tauras Gaivenis interŝanĝis orajn ringojn en la okmetra profundo de lago situanta apud urbo Trakai. Ili elektiĝis el 40 aliaj paroj por partopreni la ceremonion – iniciatitan de radiostacio – ĉar ili konatiĝis en naĝejo. Malgraŭ tio, ambaŭ devis lemi plonĝi por atingi la subakvan renkontejon.

Fakte Aušra kaj Tauras geedziĝis en



LAST



LAST

La estontaj geedzoj tuj plonĝos por interŝanĝi orajn ringojn.

la preĝejo de Trakai: nur la ringo-ceremonio okazis en la lago. Ĝi daŭris 15 minutojn kaj pasis kun ĉampano kaj kisoj en parto de la lago kun lignaj skulptaĵoj. En la profundo videblis ses lignaj kapoj: laŭ legendo neniu dronos en la lago dum ses jaroj. Poste okazis kutima balo – sur firma grundo.

LAST

Je defendo de liplegado

Garbhan MacAoidh skribis artikolon en MONATO (2000/6, p. 14), pri la komunikado de surduloj. Ankaŭ mi volas helpi la surdulojn, kaj tial mi respondas amike al G.M. Li legis libron pri surduloj, sed mi ne scias, ĉu li persone bone konas iun surdulon. Mi vivas en ĉiutaga kontakto kun parolkapablaj kaj mutaj surduloj.

Estas konate, ke surduloj inter si kapablas bone komuniki helpe de gestlingvo. Kun aŭdantoj komunikado tamen ne facilas, ĉar ili plej ofte ne volas aŭ ne emas lerni la gestlingvon. Do, surduloj, kiuj uzas nur gestojn, vivas en izolita mondeto. Eĉ ĵurnalojn ili ne povas legi ĉar ili tre malbone konas la nacian lingvon. Iliaj gestoj montras ideon, ne literojn. Malmultaj konas la fingran ortografion.

Mia plej juna filino naskiĝis surda. Verŝajne pro malsano, kiun mi kaptis dum epidemio de iu grava gripo, kiam mi estis 4-monate graveda. Neniu en Brazilo instruis min kiel paroligi mian filineton, sed, kiam ŝi estis 4-jara ni subite transloĝiĝis al Nederlando, kie ni loĝis dum 10 jaroj en Hago. Laŭ indiko de surdulkuracisto ŝi tuj iris al surdul-lernejo, kie ŝi lernis liplegadon, skribadon, legadon kaj ankaŭ lernis paroli en la nederlanda lingvo.

Per tiu instrubazo, ŝi lernis poste en Brazilo kompreni kaj paroli la portugalan. Hejme ŝi neniam uzas gestojn. Tial ŝi povas labori kun aŭdantoj, parolante 95 % normale. Kaj, por helpi multajn mutajn surdajn amikojn, nun ŝi ankaŭ lernis la gestojn, unue en São Paulo, kaj poste, tute malsaman gestlingvon en Rio de Janeiro! Ŝi edziniĝis kun surdulo, kiu feliĉe ankaŭ lernis paroli, ne en Rio de Janeiro, sed en São Paulo. Do ankaŭ en Brazilo estas kelkaj bonaj lernejoj.

Kiam aliaj surduloj, kiuj ne lernis paroli kaj liplegadon, volas ĉeesti pa-

roladon, la interpretisto ne „tradukas” al ili „laŭvorte”, montrante literojn per la fingroj, sed li montras la ideojn per grandaj gestoj. Tiel neniam eblas montri ĉiujn detalojn de la parolado.

Kiel funkcias la instrumentodo?

Ĉar preskaŭ ĉiu surdulo havas sian „aŭdreston”, la lernejoj en Nederlando ordonas la uzon de aŭdiga aparato por pliampleksigi la malgrandan aŭdkapablon. La grandaj avantaĝoj de la nederlanda lingvo estas: 1) ke multaj vortoj estas unusilabaj, kaj 2) ke la ortografio estas 99 % fonetika.

La unuaj instruendaj vortoj kaj frazoj devas signifi situaciojn, kiuj interesas la infanojn. Do: oni montras la signifon per objektoj kaj bildoj. La unua frazo kiun Marina, mia filino, lernis, es-

'Surduloj, kiuj uzas nur gestojn, vivas en izolita mondeto'

tis: *De aap zit in de boom.* (La simio sidas en la arbo.) La zoologia ĝardeno estis proksima al la lernejo. Do ĉiuj infanoj konis kaj ŝatis la simiojn. De ĉiu vorto oni instruas la prononcon, fonemon post fonemo. Do unue: *aa.* La instruisto kaj la infano sidas kune, antaŭ spegulo sur la tablo, por bone vidi la buŝon sian kaj unu de la alia. La lern-

anto devas imiti la movon de la buŝo de la instruisto. Ankaŭ li devas senti per la mano la vibradon de la gorĝo de la instruisto kaj poste meti la manon sur sian gorĝon, dirante *aa.*

Poste la *p.* La gorĝo ne vibras, sed kun la mano antaŭ la buŝo li sentas la spiron.

Fine li kunligas *aa... p, aap.* Tute kontenta la infano montras per sia fingro la simion sur la bildo, kaj diras „*aap!*” Nun li parolas. Oni instruas la aliajn vortojn de la frazo. Li prenas la kopion de la bildo hejmen por montri kaj klarigi ĝin parolante ... Granda sukceso!

Por klarigi la verbon *zit* (sidas), la instruisto devas unue stari, kaj poste sidi, dirante *ik zit* (mi sidas). Poste li staras, kaj diras *ik sta* (mi staras). Poste: *vi, li, ŝi, ktp.* Por bone lerni ĉiujn fonemojn, la infano devas ankaŭ scii, kion faras la lango ene de la buŝo. Tial oni devas montri desegnojn de la interno de la buŝo, bone montrante la pozicion de la lango. La infanoj eĉ ŝatas tiun amuzan buŝgimnastikon.

Por plursilabaj vortoj, ili devas scii kiun silabon akcenti. Por tio ekzistas aparato, kiu montras la forton de la spiro. Parolado estas muziko kun: „*pp, ff, cresc., dim.*” (Tiuj muzikaj indikoj estas alia internacia lingvo!) Tiel la melodio de ĉiu frazo montras la signifon kaj la emocijon. En la portugala lingvo la sintakso de la informaj kaj la demandaj frazoj estas egalaj. Nur la intonacio montras, ĉu oni informas aŭ demandas.

La nova verko de STEN JOHANSSON



Paĝoj: 136; 21 cm;
kudre bindita;

Prezo: **12,00 €**

“Dis!” estas humura kaj matura. Oni ne ĉiam ridas. Tia la vivo ne estas, ĝi duopas kun la morto. Kaj fakte, post tiu konsciigo la tono iom sanĝiĝas: restas loko por seriozo. Kiam la ŝercado svenas, la fikcio pli kaj pli konvertiĝas al realo.

Nu, ĉu fikcio aŭ ne, ni atingas komprenon pri la irado de la vivo. “Dis!” estas libro kun strukturo originala, psikologio majstra, observemo detalema kaj kreema, atestanta pri spiritĉeesto. Sprita. Stile brila.

Elstara libro.

Christian Declerck

Informoj:

tlf. +32 3 234 34 00;

tlk. +32 3 233 54 33;

rete: butiko@fel.esperanto.be

<http://retbutiko.esperanto.be>

Furoro de 

► Do, kiel la surduloj lernas „muzike” paroli? Oni uzas la aŭdreston kaj la aŭdparaton. En Nederlando oni instruas ludi bekfluton kaj la notojn de simplaj melodioj sen granda distanco inter alta kaj malalta tonoj.

Oni analizas la melodion de la frazo. La instruisto ludas ĝin. La lernanto legas la melodion, ludas ĝin, kaj kune kun la instruisto diras la frazon kun bona intonacio.

Hura, la admirinda surdulo parolis 95 % egale al la aŭdantoj. Ĉu vi komprenas ke mia patrino koro troplenas de dankemo? Mia filino vivas kaj laboras en la mondo de la „aŭdantoj”. Mi skribas ĉi tion por helpi la familianojn, amikojn kaj instruistojn de surduloj en la tuta mondo por ke ili helpu la surdulojn. Ankaŭ mia filino helpas multajn geamikojn inter parolantaj surduloj. Post bona ricevo, transdono estas nia devo.

Por bone instrui, observu unue viajn proprajn lipojn kaj langon. Ankaŭ via bebo devas observi vian buŝon. Do, en la komenco movu vian buŝon iomete pli ol normale. Vi ne bezonas paroli laŭte. La instruo komenciĝas en la lulilo.



Al surduloj oni montras la signifon de vortoj per objektoj kaj bildoj.

Kun via helpo la bebo poste ne estos kompatindulo. Li estos admirinda inteligentulo, kiu moviĝos en la aŭdanta mondo.

Kiu volas scii pli da detaloj, povas peti multe pli da informoj al la *Instituut voor doven* en St.-Michielsgestel [sintmiĥilshĥestl] en Nederlando.

May BIJLEVELD

N.d.l.r.: El la originalo ampleksa, la parto ne koncerna al la lingvo de surduloj estas forigita. La aŭtoro mislegis la artikolon de Garbhan MacAoidh, tamen ĉar ŝia argumento favora al la liplegado (kiu estas ĝuste malo de la opinio de s-ro MacAoidh) estas hereza al la reganta teorio, mi prezentas ĝin por fakula, objektiva komentario. Multaj lingvistoj rigardas la gestolingvon kiel kompletan sistemon de signoj, egalan al la lingvo, aŭ lingvon mem.

AŬTOJ

Ĉu ekologiaj aŭtoj el Litovio?

Italaj entreprenistoj intencas konstrui fabrikon en Vilnius por produkti aŭtojn, kies „fuelo” estas kunpremita aero. Tiaj aŭtoj tute ne poluas aeron, kaj veturi per ili 100 kilometrojn koston nur ĉ. 0,5 eŭrojn.

La unuan motoron funkciigatan per kunpremita aero kreis en 1993 G. Negre (cetere kontribuinto al la historio de aŭtomobilismo kreinte motoron de *Formulo 1*, dediĉitan por konkursaŭto de *Renault*). La aermotoro havis du cilindrojn de po 600 cm³ kaj atingis potencon de 18,4 kW (25 ĉevalpovoj). La maksimuma rapido atingebbla de aŭto kun tia motoro estis 110 km/h. En 1998 la unua tia aŭtomobilo estis elprovita en Francio, sed jam estas kreata pli potenca motoro de 36,8 kW. Por lubrikado la motoro bezonas sojfaban kuiroleon. 0,8 l da tia oleo sufiĉas por 50 000 km-a veturo.

G. Negre asertas, ke lia aŭto estas la plej ekologia en la mondo. Ĝi ellasas tre puran aeron, post maŝina filtrado. La aerujo de la aŭto entenas 300 litrojn da aero kunpremita, kio sufiĉas por 200 km. La karoserio de la



La prezidanto de „Eolo Balti” J. C. Pastorelli (dekstre) asertis, ke en Litovio oni produktos 8000 ekologiajn aŭtojn ĉiujare.

aŭto povas esti farita el karbonaj aŭ kanabaj fibroj.

Nova lando de aŭtoproduktado

Itala entreprenisto Jean Claude Pastorelli anoncis, ke la aŭto aŭtune de 2001 estos prezentita antaŭ la publiko. Li ekhavis la ideon konstrui la aŭtofabrikon en la litova ĉefurbo kaj jam pritraktis tion kun la urbestro de Vilnius, Arturas Zuokas, eĉ fondis la entreprenon *Eolo Baltia*. Tie oni produktos ĉirkaŭ ok mil aŭtojn ĉiujare. La karoserio de la aŭto probable estos farata el speciala kanaba fibro, kaj ankaŭ ĉiuj detaloj por la aŭtoj estos farataj en la sama fabriko. La aŭtomobilo, laŭ sia grandeco kaj formo, iom similos al *Renault Scenic*.

Multaj en Litovio opinias, ke la planoj de la itala entreprenisto en lando sen aŭtofabrikaj tradicioj estas preskaŭ nerealaj. Tamen la urba registaro disponigis 5-hektaran parcelon por la fabriko. Des pli, ke la italoj promesis laboron por 260 homoj en la estonta fabriko, kiu komencos la serian produktadon jam fine de 2002. LAST



Oni opinias, ke por produkto de karoserio de tia aŭto oni uzos kanabojn.

BRAZILO

Batalhundoj

En pluraj provincoj de Brazilo jam delonge estas malpermesita la bredado kaj tenado de batalhundoj (Rottweiler, Fila-Brazila kaj Pit Bull), kiuj montriĝis malfidindaj kaj vivdanĝeraj bestoj. Pro manko de severa kontrolo fare de tiucelaj instancoj tamen daŭras la bredado kaj vendado de tiaj hundoj spite al la protesto de saĝaj homoj. Ne forpasas tri monatoj sen raporto pri nova atako de unu el tiarasaj hundoj ie en Brazilo.

Marte ĉi-jare Rottweiler-hundo atakis kaj mortigis 18-monatan infaneton en la urbo Campo Bom, apud Porto Alegre, la ĉefurbo de la ŝtato Rio Grande do Sul. Tragike la knabeto apartenis al la familio, kiu posedis la beston. Poste la beston oni mortigis.

Preskaŭ samsemajne en la urbo Cai [kai] hundego de la sama raso, tenata de la paroĥestro, vagadis tra la stratoj kaj kortoj. Ĝi renkontis etan pudelon kaj atakis tiun. Ties posedanto pene provis disigi ilin. La rotvejlero mortigis la dorlotbesteton kaj atakis la posedanton, kiu devis fuĝi en sian domon. Bonŝance policisto apude deĵoranta alkuris kaj sukcesis pafmortigi la batalhundon.

En Brazilo, kiel en la tuta mondo, mankas laborpostenoj, kaj senlaboruloj por eviti malsaton, eĉ morton pro malsato, fariĝas ŝtelistoj en rapide kreskanta nombro. Hejmejoj provizas sin per ferocaj hundegoj, sed ruzaj ŝtelistoj venis al la konkludo, ke, se rabistoj senkomplete mortigas homojn, ĉu vivo de hundoj meritas de ili pli da respekto. Certe ne. Do, antaŭ ol ataki la celitan domon la bandito ĵetas venenitan logaĵon en la korton.

Bredistoj de batalhundoj monavide reklamas, ke la hundoj devas ricevi dresadon al bona konduto. Jes ja, sed ĉu oni tenas multekostan, manĝegeman hundon, por ke ĝi bonvenige svingu la voston por akcepti nekonatan ŝteliston?

G. G. VASKE

ARGENTINO - ĈILIO

Tra la Andoj boate

Estas ĝenerale akceptita principo, ke la akvejo inter du landoj rekomendindas kiel limo inter ili. Sed tio entute ne eblas en la suda parto de Latin-Ameriko. Tie estas ja riveroj, kiuj fontas el la orienta flanko de la anda montoĉeno kaj poste fluante trakrucas ĝin por enflui Pacifikon. Ekzemplo tiurilate estas riveroj Manso, Futaleufu kaj Hua-hum. Tiu geografia kaprico jam kaŭzis akrajn disputojn inter la frate samlingvaj ŝtatoj Argentino kaj Ĉilio.

Unu el tiuj problemaj akvejoj komenciĝas apud la argentina turisma urbeto San Martín de los Andes, kie situas lago Lacar [lakár] kaj altaĵo Nonthue. El tiu lasta fontas la rivero Hua-hum, en kiu antaŭ kelkaj jaroj ni surakvigis nian kanuon. Sed post malmulte da tempo nia remado jam fiaskis, ĉar mia kunulo estis forgesinta sian personan legitimilon. Sen ĝi oni ne permesis al ni transpasi la argentinan-ĉilian landlimon. Sed la akvo ne bezonas tiun formalajon kaj daŭrigas sian fluan trans la limo, enfluante la lagon Pirehueico [pireueiko].

Dubindas ĉu vere temas pri lago. Ĝia tre longa, tre mallarĝa baseno sugestas ja, ke tio tre verŝajne estas rivero, retenita de erupciaĵoj de vulkano Choshuenco [ĉoŝuenko], situanta je 2415 m super la marnivelo. La pramo veturas preskaŭ du horojn de la orienta ekstremaĵo de la lago ĝis Puerto Fuy [fuj], kie komenciĝas la samnoma rivero. Ĝin oni priskribis al mi kiel unu el la plej sovaĝaj riveroj de Patagonio.

Komence mi ne volis kredi tiun aserton. Ĉar tie, kie en antaŭaj okazoj mi estis vidinta la riveron, ĝi fluadis senkaprice. Do, mi invitis junan amikon por esplori la akvejon, veturante en mia pneŭmatika boateto. Tranoktinte en Puerto Fuy, ni plenklovis la boaton, enmetis la pakajon kaj remis al la proksima akvofunelo.

Komence ni ĝuis plezuran kunfluadon. Sed tre (eĉ tro!) baldaŭ la situacio radikale ŝanĝiĝis. Sovaĝaj rapidfluejoj kaj kaskadoj alternis, nin devigante albordigi la boateton. Ofte ni grimpis laŭ la roka bordo trenante la pakajon, la boaton kaj nin mem per ŝnuregoj. En kelkaj lokoj mi riskis traremi rapidfluejojn kun la pakajo – sen mia amiko, kiu sekvis min, irante inter la rokaĵoj de la riverrando.



De lago Pirehueico oni rigardas domojn de Puerto Fuy kaj la komencon de rivero.



Sovaĝaj rapidfluejoj nin devigis albordigi la boateton.

Post ses horoj de tiaj akrobataĵoj ni estis plene elĉerpitaj kaj decidis finian surakvan veturon. Suprengrimpinte la dekstran taluson, ni trenis la boaton al la rando. Mi proponis tie bivaki. Ni ja kunportis dormosakojn. Sed mia kunulo ne fidis je la arbarega ĉirkaŭo kaj preferis tranokti pli komforte aliloke. Erare ni supozis, ke la ŝoseo de Puerto Fuy al Neltume proksimas. Sed serĉante vojon tien, ni ne trovis ĝin. Krome densa aro da bambutigoj baris la antaŭeniron en la arbarego. Do, kun nia boato kaj pakaĵo estis apenaŭ eble atingi la ŝoseon.

Nun ni memoris, ke sufiĉe proksime ni estis vidintaj antaŭe kabanon sur altaĵo de la bordo. Tial ni konsentis, ke Tomaso, mia juna amiko, iros tien por dungigi du virojn, kiuj konas eliron kaj portos nian pakaĵon. Efektive post pli ol unu horo mia kunulo revenis kun du viroj, kiuj konis apenaŭ troveblan vojeton. Laŭ ĝi ni atingis la ŝoseon, kiam eknoktiĝis. Sed nun niaj helpantoj ne volis akompani nin ĝis la proksima vilaĝo Neltume. Ili preferis iri hejmen antaŭ la nokto, timante pumon. Mi respondis, ke tiuj kategoroj kutime ne atakas homojn. Sed ili asertis, ke antaŭ kelkaj tagoj pumo mortigis virinon kaj manĝis parton de la viktimo. Do, ni pagis la portintojn. Feliĉe alveturis kamioneto kaj per ĝi ni atingis la vilaĝon.


La sekvan matenon ni reiris piede al la rivero Fuy por admiri denove ĝiajn sovaĝajn fluejojn. Tiam nin impresis la impona akvofalo Huilo-huilo, kiu elverŝas la akvojn de Fuy al profundego. Belega estas la arbarega vegetaĵaro, kiu ĉirkaŭas tiujn pentrindaĵojn.

Jarojn poste mi kun amikino revenis al tiu loko. Mi montris al ŝi tiun belan arbaregan akvofalon. Poste ni veturis al lago Panguipulli [pangipujji], kie Fuy enfluas. Tie ni luprenis boaton por veturi laŭ rivero Enco [enکو] ĝis lago Riñihue [rinjiue]. Trapasante la facilajn rapidfluejojn de Enco, ni vidis plurfoje anasojn kun belaj oranĝaj bekoj. Ili latine estas nomataj *Merganetta armata*. Tiuj birdoj specialiĝis manĝi estaĵojn en la oksigenriĉa akvo de la rapidfluejoj.

El la lago Riñihue fluas rivero San Pedro, kiu enverŝas siajn akvojn en grandegan riveron Calle-calle [kajekaje]. Sur ties bordo situas la grava ĉilia urbo Valdivia. De tie ni veturis tre komforte en granda turisma ŝipo al la antikvaj fortikaĵoj de Niebla kaj Corral [koral], per kiuj en la epoko de hispana kolonio oni defendis tiun urbon kontraŭ malamikoj kaj piratoj. Tiuloke, finfine, la akvoj de argentina lago Lacar enfluas Pacifikon.

Werner SCHAD

Unuafoje en Esperantujo



Paĝoj: 200; ilustrita;
21 cm; kudre bindita;

Prezo: 18,00 €

Plena monografio pri moderna astronomio

La kosmo kaj ni: galaksioj, planedoj kaj vivo en la universo, akorde kun sia subtitolo (elementa kurso pri astronomio), konsistigas veran manlibron pri teoria kaj praktika astronomio. Skribita de du profesiaj astronomoj (David Galadí-Enríquez kaj Amri Wandel), ĉi tiu konciza verko prezentas tre aktualan bildon pri nuntempa astronomio en lingvaĵo kaj stilo facile komprenebla de ne-fakuloj. Verko blank-nigre ilustrita per desegnaĵoj kaj bildoj, kiuj akompanas kaj klarigas la tekston.

Informoj:

tlf. +32 3 234 34 00;

tlk. +32 3 233 54 33;

rete: butiko@fel.esperanto.be

<http://retbutiko.esperanto.be>

Enkonduko al senpena kaj malmultekosta okupo historia

Kiam ni estis infanoj, mi kaj mia fratino ofte pasigis semajnfinojn ĉe niaj geavoj, kiuj loĝis en morna provincurbo. Ĉiun dimanĉon posttagmeze ni piedpromenis kun la avo. La promenado ĉiam havis unusolan celon, nome la tombejon - ne la litomiŝlan¹, sed la lokan, tiam relative novan, kaj do, tute ne interesan.

Tiutempe diference de nun, neniu el nia familio estis ankoraŭ enterigita en ĝi. Ĉar mia avo ŝajne ne havis amikojn (vivantajn aŭ mortintajn) en la urbo, mi supozas, ke la vizito tien ne estis por honori la memoron de iu forpasinto, sed pro iu melankolia trankvilo, kiun li sentis en la ĉeesto de sendanĝeraj mortintoj. Nia avo provis montri sin sufiĉe amuza kunulo, sed li estis malgaja homo funde de sia koro. Ne laŭnature, sed pro malfeliĉo kaj malagrablaj vivspertoj. Li estis profesia fotisto kun malmulte da klientoj. El ili verŝajne kelkaj eĉ ne pagis por la menditaj fotoj, konstatinte, ke li uzis malmodernan kaj malbone funkciantan fotilon. Plie, mi rekonas, ke nek lia geedza vivo, nek lia malluksa hejmo kontentigis lin en la mizere teda urbaĉo.

Generale mi ne ŝatas tombejojn. Tamen estas kelkaj, kiujn mi trovas historie interesaj, kaj ne malmultaj eĉ tre belaj. Foje, feriante en Nord-Bohemio, mia edzino kaj mi hazarde trovis malnovan tombejon en iu vilaĝo Janov. Tie surprizis min, ke nur malmultaj el la pli novaj tomboj estas de ĉeĥlingvanoj. Sur la plimulto de la tomboŝtonoj, la nomoj de mortintoj estis germanaj. Pli ofte estis indikita la germana nomo de la vilaĝo (Johannesberg) aŭ de iu alia loko en la ĉirkauaĵo, kie loĝis la mortinto. Kompreneble, ni sciis, sed ĉi-momente forgesis, ke la loĝantoj de tiu regiono estis germanoj ĝis la fino de la dua mondmilito. Mi amuzis min, divenante la

aktualajn ĉeĥajn nomojn de diversaj germanaj vilaĝoj.

Por mi precipe elvokiva estis pensado pri la grandegaj demografiaj ŝanĝoj, kiu okazis antaŭ ne tre longe en tiu parto de Mez-Eŭropo. Mi venis al la konkludo, ke bona elirpunkto por studi la historion de la homaro estas la tombejoj. Vizito al tombejo kostas nenion kaj, se regas bela vetero, ĝi povas eĉ agrabli.

Ankaŭ en Irlando, kie ni nun loĝas, la tombejoj spegulas la grandajn aliĝojn, spertitajn en la dudeka jarcento - do, dum la propra vivdaŭro de multaj el ni. Mia hejmo situas inter du tombejoj: La plej proksima - la katolika - estas moderna parkosimila areo, kie la najbaroj promenigas siajn hundojn. La pli malproksima - la anglikana - estas trankvila loko, ombrata de grandaj fagoj kaj aliaj arbegoj, kies semojn kaj etajn arbidojn kolektas mia edzino por estigi japanstilajn bonsaj-arbetojn.

Sur la tomboŝtonoj en la katolika tombejo preskaŭ ĉiuj nomoj estas tipe

irlandaj (keltaj). Du-tri estas angladevenaj, ekzemple, *English* kaj *Lowbridge*, sed iliaj posedantoj estis sendube plurgeneracie irlandanoj. Pli ofte la irlandaj nomoj aperas en angligita formo, sed aliaj familioj aŭ familianoj preferas uzi la originalan gaelan. Kutime ĉi-lastata tute ne aŭ apenaŭ similas la angligitan. Do, ekzemple, en sama familio, kelkaj anoj nomas sin *Breathnach* [br'anaĥ], dum aliaj - fratoj aŭ kuzoj - uzas la anglan formon *Walsh* [ŭolŝ]. Ambaŭ signifas „kimra”, sed en malsamaj lingvoj.

Kiam la nomoj estas skribitaj aŭ gravuritaj sur la tomboŝtono, ili ŝajnas esti eĉ pli malsimilaj. Sur iu kvarangula steleo en la katolika tombejo la sama familia nomo aperas malsame skribita, ne nur laŭlingve, sed ankaŭ laŭalfabete. Sur unu flanko, iu familiano estas nomita *Egan* [igan], skribita per la komuna latina alfabeto, dum alia nomas sin, en kelta formo, *Ó hAodhgháin* (ne imitebla en la esperanta aŭ angla fonetiko). Ĉi-lastata ne estas tiel skribita (kio estas pli moderna skribmaniero), sed per tradiciaj irlandaj manuskriptaj literoj kun punkteto super la „d” kaj la „g”², anstataŭ la hodiaŭa literumado per „h” post konsonantoj. Tiu bela, sed





ne tre konvena alfabeto estis instruata en la irlandaj lernejoj ĝis proksimume 1960. Tial ĉi-okaze ni povas diveni al kiu generacio apartenas la mortinto.

Kontraste, en la anglikana tombejo, malfermita en la 19a jarcento, apenaŭ troviĝas irlandaj nomoj pro la fakto, ke ĝis la fondiĝo de Libera Ŝtato en 1921 Irlando estis regata de Britio. Dum jarcentoj nur la anglikana eklezio estis oficiale agnoskata, kvankam preskaŭ la tuta indiĝena loĝantaro estis romkatolika. Pro tio, eĉ hodiaŭ oni ofte povas diveni la konfesion de iu ajn homo laŭ lia familia nomo.

Ĉar la britoj (precipe armeanoj kaj registaraj funkciuloj) forlasis Irlandon post 1921, kaj multaj anglo-irlandanoj ne volis resti en la lando post la starigo de la tute sendependa Respubliko Irlando en 1949 kaj post ties samtempa eliro el la Unuiĝinta Brita Reĝlando. Tiuokaze la anglikana komunumo ege ŝrumpis. Do, la anglikana tombejo en nia urbo estas tre malgranda kompare kun

la ĉiam pli vastiĝanta katolika.

En nia katolika tombejo - kaj en aliaj en la tuta respubliko - eble unu el la plej strangaj fenomenoj estas sporada kaj subita apero dum la lastaj jaroj de pluraj identaj simplaj malgrandaj grizaj tomboŝtonoj kvadrataj. Ĉiuj havas en la supra parto insignon de iu arma regimento aŭ korpuso, ĉiuj aspektas tre novaj. Sed la plimulto de nomoj kaj datoj rilatas al homoj - ofte tre junaj: 17- aŭ 18-jaraĝaj - kiuj estis mortigitaj en la unua mondmilito (1914-1918), kaj malpli ofte en la dua.

Tiuj monumentoj - supozeble starigitaj laŭ mendo de la brita komisiono respondeca pri militaj tomboj - aperis nur lastatempe, pro la fakto, ke en la sendependiĝinta Irlando, oni hontis pri militservo de irlandaj junuloj en britaj surteraj

trupoj, mararmeo aŭ aerarmeaj fortoj. La kialo estas, ke Britio estis antikva malamiko de la irlandanoj. Do, oni konsideris tiujn soldatojn, volontulojn aŭ konskripciulojn perfiduloj kaj intence forgesigis, kvazaŭ ili neniam ekzistus. Temas pri multaj miloj.

Krom la du menciitaj tombejoj en nia urbo, estas alia pli antikva, kie, en amasa tombo sur malgranda spaco, estis enterigitaj homoj, kiuj mortis pro la granda malsato meze de la 19a jarcento. En la sama tombejo troviĝas la tombo de hanovriaj solduloj, kiuj servadis kiel parto de la brita garnizono. Apud la enirejo staras plinto kun dulingva surskribo (germane kaj angle) memore al hanovria oficiro, mortinta en la 18a jarcento. Pli nova monumento, starigita laŭ iniciato de membroj de Amnestio Internacia kaj arbo donacita de lokaj esperantistoj, memorigas pri la sennombraj homoj tutmonde, kiuj estis kaj estas senigitaj je siaj homaj rajtoj.

Do, tio estas enkonduko en la historian esploradon de tombejoj. Provu ankaŭ vi mem praktiki ĝin en via loka tombejo!

Noto: Pli ambiciaj homoj povus esplori prahistoriajn tombejojn kaj aliajn fascinajn arkeologiejojn, kiuj abundas sur la tuta irlanda insulo. Tio certe estas interese, eĉ pli ol nura hobiaj kaj iĝas serioza okupo. Diference de mia edzino, kiu kiel amatoro faras arkeologiajn studojn, mi estus tro pigra kaj malserioza por tiaspeca esplorado.

1. *La Litomiŝla tombejo*, originala romano en Esperanto de la ĉeĥa verkisto Karolo Piĉ.
2. ó hAodgáin.

Garbhan MACAOIDH



Detaloj de murpentraĵo en Seatlo montras erojn de la historio de la loka ĉarpentista sindikato.

USONO

Kiel pentri demokration?

„Arto nur por arto!” Ĉi tiu instiga krio por multaj artistoj en moderna arta „Gomoro” tro ofte kondukas al narcisismo kaj detruaj komentoj pri la homa spirito, se tion entute eblas nomi komentoj.


Tute alia estas la pli kaj pli videbla arto de usona pentristo T. Scott Sayre [skot sejr]. Liaj historiaj murpentraĵoj (inter kiuj estas du, bildigantaj ĝemelurbojn – usonan Cupertino kaj japanian Toyokawa) instigas homojn kuniĝi per la sento de komuneco, ne limigita per spaco kaj tempo. Sindikatoj ekde Seatlo ĝis Sanfrancisko konstatis, ke liaj zorge esploritaj rakontoj sur tolo donis al laboristoj novan senton de graveco de ilia laboro kaj novan spiriton de organiza unueco, kiun ĉi tiu mondparto tre bezonas. Vizitantojn de la urbocentra placo

„Jack London” en la kalifornia Oakland salutas la atentokapta interplekto de scenoj pentritaj de Sayre, priskribantaj la aventurojn kaj librojn de Jack London. Sed la kreado de Sayre estas ja tre varia. Li kreis T-ĉemizojn kaj poŝtkartojn por Esperanto-Ligo de Norda Ameriko. Lia arto beligas paĝojn de kelkaj socie gravaj libroj. Kaj per la novaj metodoj miksi lumon, koloron, ŝanĝiĝantajn organikajn formojn, muzikon kaj dancon, li kaj lia kunulino Lucy Lewis antaŭ nelonge prezentis al publiko artan spektaklon, stimulantan la imagokapablojn de kuracistoj.

Unu entuziasma rigardanto diris: „Lia

lumprezento vekas ion en la subkonscio. La lumo havas la mirigan efikon malfermi la menson por novaj ebloj, senrilate al la kampo, kiu vin interesas.” Kelkaj bildoj de la lumprezento de Sayre videblas ĉe www.studiowindows.com.

Sayre mem pri siaj verkaĵoj estas multe pli modesta. „Trovegas multajn bonajn artistoj. Mi nur ĝojas esti viva,” – li diris. „Sed la arto estas amuza, kaj se mi povas aldoni ion al la vivoj de aliaj, estas des pli bone.” En siaj filozofiaj pripensoj, li aludas al la kontakto kun ia pli profunda kurento de la krea vivo. „Mi ja opinias, ke gravas por artistoj esti plene



Scott Sayre paŭzas dum la pentrado de sia murpentraĵo por la sindikato de lad-prilaboristoj en San-Francisko.



Pentraĵo „Hejmo estas...” kiun Scott Sayre pentris por la kovrilo de libro „Demokratiigo ĝustatempa” troviĝas ankaŭ sur la esperantlingva poŝtkarto.



Verkaĵo de Scott Sayre omamas poŝtkarton kaj T-ĉemizojn, eldonitajn de Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko.

konsciaj pri la dimensioj de la tempo, kompreni la signifon de sia arto, kaj klopodi unuigi la specifan kun la universala.” Tia sinteno frape similas al la „Manifesto de la artista grupo de *De Stijl* [stejl]”, aperinta en 1918 en Amsterdamo.

Sayre kontraktis kun la organizaĵo „Sintropiaj Vilaĝoj” por produkti grandan murpentraĵon pri la monda historio de demokratio. La grandega verkaĵo inkluzivos la scenojn, reprezentantajn la evoluon de demokratio ekde ĝia plej primitiva komenco, ĝis ĝiaj universalaj idealoj. Inter multaj aliaj, la rolo de Esperanto kiel demokratia komunikilo, ebliganta al ĉiu egale sin esprimi, reprezentigis en la pentraĵo. Oni kolektas ideojn kaj informojn por la pentraĵo. Dezirantoj proponi historian okazaĵon el sia regiono aŭ lando povas kontakti (en Esperanto aŭ en la angla) s-ron Scott Sayre aŭ s-ron Will Foreman: „Sintropiaj Komunumoj”: PMB N 693, 2425B Channing Way, Berkeley CA 94704, Usono, aŭ rete: jgc@syntropix.net

Por la projekto oni invitas patronojn kaj subtenantojn. Tiuj ricevos ankaŭ senpagan subskribitan presitan bildon, faritan el parto de la pentraĵego. Bilda raportado pri la progreso de la laboro troviĝos ĉe www.syntropix.net. Ĉi-jardeke la organizantoj planas publike montri la pentraĵegon en multaj mondaj lokoj, bildigitaj en la pentraĵo.

John G. CHAMPLIN

KALININGRAD

Kion kaŝas la Kvendan-fortikaĵo?

La tridekjara laboro de muzea ekspedicio en Kaliningrad (eksa Königsberg) kroniĝis sensacie. Estas trovitaj ĉirkaŭ 17 mil objektoj de la Prusa Muzeo, fondita en 1844. Iam ĝi estis unu el la plej grandaj en Eŭropo, kaj entenis 240 mil valorajn objektojn. Antaŭ la sturmo de Königsberg (1945) la direktoro de la muzeo sukcesis disdeponi la muzeaĵojn en tri kaŝejojn. La unua situis apud la urbo Rastenburg (nun Kentŝin), la dua en la subterejoj de Ordenskij (Ordena) kastelo. Post la milito la restaĵoj el ambaŭ kaŝejoj estis retrovitaj kaj nun estas ekspoziciataj en Varsovio kaj Kaliningrad.

Sed la plej valoraj muzeaĵoj troviĝis en Kvendan, konata al kaliningradanoj kiel „La tria fortikaĵo”. Dukorta kaj trietaĝa, ĝi estis konstruita dum la regado de Frederiko la 3a. Postmilito tie longe situis armedeponejo kaj milittrupoj de la sovetia armeo. Pro tio la loko estis kaŝata kaj nealirebla por esplorantoj. Tamen kelkaj scivolemaj soldatoj memstare trovis du ĉambrojn plenajn da kestoj kaj bronzaj statuoj. Videblis iuj ostaj (ĉu eburaj?) ekspoziciaĵoj kaj surplanke dise kuŝis malnovaj moneroj. Post la militservo unu el la soldatoj priskribis unu statuon. Temis pri virino pompe vestita, kun floroj surbruste, tenanta en unu mano bastonon, kaj en la alia globon.

Nur ekde 1998 la tria fortikaĵo iĝis

alirebla por simplaj vizitantoj. Plej serioze laboris la esplorgrupo de Avenir Ovsjanov, kiu eĉ dum sia libera tempo vagadis en la subterejoj. Foje, dum unu el siaj vagoj, li rimarkis iujn rustaĵojn. Li enpoŝigis la specimenojn kaj ĉe la taga lumo rekonis en ili fragmentojn de piedingoj el la 11 jarcento. Sekvatage la esplorantoj trovis tie jam 600 muzeaĵojn kaj en ĉiu posta tago po 1500 ĝis 2000 valoregajn historiobjektojn. Ĉi tio okazis vintre, kaj estis tre malfacile dum malvarmego kaj frostaj trablovoj mane fosi sablon, kaj poste kribradi ĝin ...

Ovsjanov petis helpon pere de televido. La urbaj instancoj povis doni nur 500 rbl (malpli ol 20 usonaj dolaroj), parton de kiuj Ovsjanov elspesis por veturi al Carskoje Selo (apud Sankt-Peterburgo). Tie li esploris priskribon de la dumilite malaperintaj statuoj, unu el kiuj estas statuo de la carino Jekaterina la 2a kun scepro en unu mano, kaj globforma mezurilo en la alia. La statuoj ne estas trovitaj ĝis nun. Iuj diras, ke multe pli frue oni fordonis ilin por refandi, aliaj diras, ke ili estis ien forportitaj. La plej freŝa versio informas, ke „iuj subterejoj estis eksplode grundkovritaj por konservi la neprirabitajn muzeaĵojn ĝis pli favora tempo”. Eble tie troviĝas ankaŭ la statuoj?

Anatolo GONĈAROV

DISKOJ

Vera Esperanta muziko

Se iu demandas vin, ĉu Esperanto havas muzikan kulturon, donacu al tiu la kompaktan diskon *Duone* de Thierry Faverial (Francio). Ĉiuj dek kantoj estas aŭskultindaj. Faverial kantas kaj akompanas sin mem. La tekstoj estas verkitaj originale en Esperanto de li kaj de aliaj personoj. La kanto *Malhoma Parizo* peras tristan impreson pri la franca ĉefurbo. *La longa vojaĝo* rakontas pri la kruelaj travivaĵoj de iu knabo: „Ĉe la oceano / Staras la infano / Larmoj el okuloj / Frontas l' ondoluloj. / Ili nokte venis / Kaj perforte prenis / Patron for malpace / Fikruelminace”.

Oni komprenas la tekstojn ankaŭ sen la akompana kajereto. La elparolo estas tre klara, se oni preteraŭdas bagatelajn erarojn kiel „ĉus” anstataŭ „ĵus” aŭ „re-evenis” anstataŭ „revenis”. Resume: la disko estas ege rekomendinda!

Walter KLAG

Thierry Faverial: *Duone*. Eld. la aŭtoro, Perigueux, 2001. Prezo ĉe FEL: 18,30 EUR + afranko.



IDEALA por libroamantoj ...

La serio Stafeto de Flandra Esperanto-Ligo estas daŭrigo de la fama eldonejo de Juan Régulo Pérez en La Laguna. Kiel iame en Kanariaj Insuloj, la verkoj kiujn FEL markas per Stafeto, estas altkvalitaj literature kaj prese. Depost 1986 en la serio jam aperis verkoj de i.a. Gaston Waringhien, Edwin de Kock, Krys Ungar, Eŭgeno Miĥalski kaj multaj aliaj.

Anoj ricevas dekonan rabaton (10%) je ĉiuj libroj en la serio Stafeto de Fel.

Ŝparu kaj estu ĝisdata!

Membroj de librorondo Stafeto ricevas novaperintajn Stafeto-librojn kiel unuaj, tuj post apero kaj ĝuas rabaton kiu por unu aŭ du ekzempleroj de sama titolo altas 10%, kaj ekde tri ekzempleroj eĉ 40%!

Kiel funkcias?

Vi deponu ĉe ni 25 EŬR (depono = mono kiu restas via kaj kiun vi kiam ajn povas repostuli). Vian monon ni utiligos por eldoni librojn. Kiam aperas nova libro en la serio, vi apartenas al ĝiaj unuaj legantoj.

Via garantio

Se ial ne plaĉas al vi unu el la libroj kiujn ni al vi sendas, vi simple resendu la libron ene de ok tagoj kaj neniom pagu. Krome, ajnmomente vi rajtas retiriĝi el la librorondo. Vi ricevos vian deponon kaj ni ne plu sendos al vi librojn.

Ĉu io por vi? Skribu al FEL:

Flandra Esperanto Ligo

Frankrijklei 140

2000 Antwerpen


tlf. +32 3 234 34 00

tlk. +32 3 233 54 33

rete: butiko@fel.esperanto.be

<http://retbutiko.esperanto.be>

Stafeto
librorondo





La ikonono

de Julian Modest

La vilaĝo estis eta, kaŝita ĉe la piedoj de Balkano. Oriente de ĝi vastiĝis densa kverka arbaro kaj okcidente - la kamparo. La homoj, kiuj loĝis ĉi tie, estis kvietaj kaj laboremaj. La vilaĝo havis la neordinaran nomon Kareso. Neniu el la loĝantoj povis diri kiu kiam donis tiun ĉi belan kaj poezian nomon al la vilaĝo.

Kiel por multaj vilaĝoj, tiel por Kareso, oni rakontis diversajn mirindajn legendojn. Iujn el ili delonge oni forgesis, sed unu daŭre okupis la imagon ne nur de la vilaĝanoj de Kareso, sed de ĉiuj kiuj hazarde preterpasis la vilaĝon aŭ venis en ĝin.

La homoj rakontis, ke ĉe la fino de la vilaĝo, ĉe la fonto, proksime al la vojo, kiu pasas tra la kampo kaj gvidas al la urbo, sur la senarbejo Patrino Larmo, iam nokte dum aŭgusto, kiam ne estas luno, aperas ia stranga brilo. Iuj diris, ke ĝi similas al kolora fajro, aliaj asertis, ke ĝi estas kiel fasko da oraj radioj, sed tre malmultaj homoj vidis tiun ĉi brilon.

Oni rakontis, ke tie estis enfosita la ortrezoro de turka

bejo. Kiam la turkoj fuĝis de Bulgario dum la rusa-turka milito, bejo, kiu tiam regis la vilaĝon, vidis, ke li ne povas forkuri kun sia tuta trezoro kaj ordonis, ke oni kaŝu tie parton de la oro, kiun li portis. Fama estis tiu ĉi legendo kaj multaj trezorserĉantoj ofte fosis sur Patrino Larmo, sed ĝis nun nenion ili trovis. Certe ĉio, kion oni rakontis estis nur fabelo, kiu fajrigis la imagojn kaj gardis la memoron pri pasintaj tempoj, vualitaj en mistero.

Pri Patrino Larmo oni rakontis ankaŭ alian legendon, tamen multaj homoj delonge ĝin forgesis. Oni diris, ke sur tiu ĉi senarbejo, ĉe la fonto, iam estis bela blanka monaĥejo, simila al kolombo, sidiĝanta sur la verda senarbejo, inter la jarcentaj kverkoj. Kiam la turkoj konkeris la vilaĝon, ili ruinigis kaj bruligis la monaĥejon kaj eĉ spuron ne restis de ĝi. Nun neniu scias kiel aspektis tiu monaĥejo.

Kiam li estis infano, Trajan plurfoje aŭdis tiujn ĉi legendojn. Lia avino kutimis rakonti ilin vintre. Tiam ŝi kaj Trajan sidis ĉe la varma forno en la eta vilaĝa ĉambro. De iom malfermita pordeto de la forno videblis la ludemaj flamoj ĵetis misteran lumon sur la sulkiĝintan kaj velkintan avinan vizaĝon. Tiam Trajan aŭskultis ŝin sinforgese kaj lia infana imago detale pentris la monaĥejon kaj la grandegajn flamajn langojn, kiuj malsate neniigis la monaĥejajn konstruaĵojn. Lia infana koro tremis kaj Trajan ne povis kompreni, ke dum la avino rakontis tiujn ĉi teruregajn historiojn, ŝi ruzete ridetis, ĉar ŝiaj fabeloj igis Trajan forgesi la ludojn kaj petolojn.

Delonge jam Trajan loĝis en la urbo, sed ofte li vizitis la vilaĝon kaj la gepatran domon. Somere li kutimis ripozi en la silenta kaj friska korto de la olda gepatra domo. Dum la lastaj jaroj, kiam lia vivo fluis kiel sablo, Trajan pli ofte venis en Kareson. Nur ĉi tie li povis vere ripozi, malproksime de la ĉiutagaj zorgoj kaj problemoj.

Ĉi-semajnfine, kiel kutime vendrede posttagmeze, Trajan preparis sin por ekiri al Kareso, tamen antaŭ la ekveturo, li rimarkis, ke la aŭto ne tre bone funkciis kaj li devis iom ĝin ripari. Nesentebles vesperiĝis.

Trajan stiris malrapide. Post horo li estos en la vilaĝo kaj jam antaŭsentis la plezuron de la ripozo; li eksidos en la korto, sub la olda pirarbo, preparos salaton de tomatoj kaj kukumoj,

verŝos en etan glason iom de la hejma forta brando kaj en la nokta frisko li longe ĝuos la susuron de la arbofolioj. Trajan ŝatis la somerajn noktojn en Kareso, kiuj memorigis lin pri lia infaneco, pri liaj gepatroj kaj parencoj, kiuj delonge jam translokiĝis en la transon.

La vojo al Kareso estis dezerta. Videblis nek aŭto, nek kamiono. Eĉ lumo ne estis en ĉi agrabla aŭgusta nokto. Baldaŭ Trajan proksimiĝos al senarbejo Patrino Larmo kaj eniros en la silentan dormantan vilaĝon. Antaŭ la senarbejo estis vojkurbiĝo kaj Trajan iom reduktis la rapidecon. Ĝuste tiam li rimarkis ian fajron inter la arboj. Strange? Kiu bruligis fajron ĉi tie meze de la nokto?

Trajan jam preskaŭ premis la gaspedalon, kiam ŝajnis al li, ke la fajro estas multkolora - blua, flava, roza, ora. Subite li opiniis, ke li haluciniĝas aŭ sonĝas. Trajan iom deflankiĝis de la vojo, bremsis kaj kelkajn sekundojn senmova sidis en la aŭto. La fajro aŭ la koloraj lumoj daŭre ludis inter la arboj. Li pli kaj pli konsterniĝis kaj ne sciis kion entrepreni. Ĉu li sonĝis, imagis aŭ tio estis ia ŝerco? Subite Trajan rememoris la legendon pri la

► enfosita ortrezoro de bejo kaj jam kredis, ke iu ŝercas. Trajan ne estis timema kaj decidis mem vidi kio okazas. Li eliris el la aŭto kaj ekiris al la arboj, kie videblis la stranga brilo. Li paŝis malrapide, singardeme, sed kiam li estis je du metroj de la brilo, ĝi subite perdiĝis kaj aperis denove iom pli flanke kaj pli malproksime de li. Tiel Trajan vagis tra la senarbejo Patrina Larmo kaj ne povis kompreni kio okazis. La brilo jen aperis, jen malaperis. Nenie videblis homo kaj ĉie regis profunda silento. Post duonhora vagado tien, reen, Trajan konvinkiĝis, ke ĉio estas sensenca kaj freneza. Li revenis en la aŭton, funkciigis ĝin kaj daŭrigis al la vilaĝo.



Ĉu li sonĝis aŭ tio vere estis la fajro pri kiu oni asertis, ke ĝi aperas tie, kie estas enfosita la trezoro? Sed tio estas nur legendo. Ja, trezorserĉantoj, kiuj venis de proksime kaj malproksime delonge plurfoje trafosis la tutan senarbejon Patrina larmo kaj trovis nenion.

Trajan eniris la gepatran domon, preparis salaton, verŝis iom da brando en etan glason kaj sidiĝis ĉe la tablo en la korto, sub la volbo de la vito. Li longe sidis kaj provis forgesi la neordinaran brilon. „Tio estis nur vizio - li meditis - Mi estas tre laca, aŭ eble mi jam sufiĉe maljuniĝis.”

Li estis sesdekjara kaj post du monatoj devis pensiĝi. Lia edzino forpasis antaŭ dek kvin jaroj kaj lia filino kun sia familio loĝis en Burgas. Foje, foje en la jaro ŝi gastis ĉe li kaj ankaŭ Trajan foje jare veturis al Burgas por vidi la genepojn.

Ĉi-nokte Trajan malfrue enlitiĝis. En Kareso, kie la aero estis pura kaj ĉiam regis silento, li kutime bone kaj profunde dormis, sed ĉi-nokte li ne povis ekdormi. Dufoje li ellitiĝis, eliris el la domo, promenis en la korto kaj poste denove enlitiĝis. Je tagiĝo Trajan ekdormis kaj sonĝis strangan sonĝon. Li estis sur senarbejo Patrina Larmo kaj nenion oni povis vidi en la mallumo. Subite antaŭ li io blanka moviĝis. Trajan streĉis rigardon kaj vidis junan virinon, vestitan en longa blanka robo, pli ĝuste en longa blanka ĉemizo. Ŝi estis nudpieda, kun blondaj haroj, similaj al pezaj oraj fadenoj. La junulino kvazaŭ ridetus al li kaj logis lin postsekvi ŝin. Pezspirante Trajan rapide paŝis post ŝi, sed antaŭ ol esti atingita aŭ tuŝita, la junulino malaperis kaj poste tuj subite ŝi aperis malantaŭ li aŭ flanke de li. Trajan kuris inter la arboj, aŭ dekstren aŭ maldekstren, sed vane. Li ne povis proksimiĝi al la junulino. Li vekiĝis ŝvita, laca kaj senforta.

Dum la tago li provis fari ion, sed la laboro ne prosperis. Fin-fine Trajan ĵetis la ilojn kaj ekiris al la senarbejo Patrina Larmo. Li ne sciis kio tiris lin tien, sed deziris bone trarigardi la senarbejon je taga lumo. Li paŝis rapide kaj preskaŭ ne rimarkis la homojn, kiuj preterpasis lin kaj afable lin salutis.

Trajan venis al la senarbejo, trinkis akvon de la malvarma fonto kaj longe silente sidis ĉe la fonto. Nenio stranga videblis tie. Ĉio estis tiel, kiel li memoris jam de la infaneco. Trajan provis rememori sian sonĝon kaj ŝajnis al li, ke sonĝe li vidis la junulinon sub la branĉoj de la olda saliko, kiu kreskis ĉe la fonto. Jes, en la sonĝo, Trajan tre klare vidis la salikon.

Tamen li decidis, ke ne estas senco pli sidi tie kaj ekiris al la vilaĝo. Survoje io denove komencis tikli lian scivolemon. Ĉu vere ne estas trezoro, kaŝita tie? Kion signifas la koloraj flamoj hieraŭ nokte kaj la stranga sonĝo? Ĉiam li opiniis sin realisto, homo, kiu stabile staras sur la tero, tamen nun io forte igis lin preni fosilon kaj ŝovelilon kaj komenci fosi sub la olda saliko, ĉe la fonto sur Patrina Larmo. „Kion opinios liaj samvilaĝanoj? - meditis Trajan. - Eble ili diros, ke li freneziĝis.” Ĉiuj konis lin kiel saĝan kaj seriozan viron. Trajan finis universitaton, estis inĝeniero. Tre malmultaj vilaĝanoj finis universitaton kaj Trajan bone sciis, ke liaj parencoj

kaj konatoj fieras pri li.

Trajan prenis la fosilon kaj ŝovelilon kaj kvazaŭ iu lin pelus, li ekiris denove al Patrina Larmo. Li ekstaris sub la jarcenta saliko kaj provis rememori kie ĝuste en la sonĝo li vidis la junulinon en la blanka robo. Ŝajne ŝi staris oriente de la fonto. Trajan komencis fosi je kelkaj paŝoj de la saliktrunko. Li fosis rapide, sen halti, spiris profunde, ŝvitis kaj salaj ŝvitgutoj ruliĝis sur lia vizaĝo. Trajan rimarkis, ke al la fonto proksimiĝis maljunulino, sed li ne ĉesis fosi, li nur ŝajnigis, ke li ne vidas ŝin. La maljunulino kliniĝis, trinkis akvon de la fonto. Iom ŝi observis lin kaj krucsignis. Eble ŝi opiniis, ke Trajan malsaniĝis aŭ freneziĝis kaj tial li fosas ĉi tie, ĉe la saliko, dimanĉe matene.

Trajan tamen daŭre fosis. La neordinara forto igis lin fosi kaj li ne sentis lacon. Li pli kaj pli ŝvitis kaj demetis la ĉemizon. Trajan ne memoris antaŭ kiom da jaroj li lastfoje fosis. La fosaĵo jam estis ĉirkaŭ duonmetron profunda, kiam la fosilo frapis ion malmolan. Ne estis metalo, sed ligno. Trajan ĵetis la fosilon, genuiĝis en la fosaĵo kaj malkovris lignan tabulon. Granda senrevigo obsedis Trajan. Ne estis la trezoro, sed eble ia putrita ligna tabulo, kiu hazarde troviĝis tie. Tamen la tabulo estis bone kaŝita, ĉar ĉirkaŭ ĝi videblis ege malnovaj restaĵoj de ia teksaĵo, delonge jam ŝirita kaj putrinta. Tiuj ĉi teksaĵaj pecoj verŝajne estis de kanaba sako. Evidente la tabulo estis diligente kaj atente volvita en ĝi, sed delonge jam la sako putriĝis kaj ŝiriĝis. Trajan elprenis la tabulon, viŝis ĝin per manplato kaj rigidiĝis. La tabulo estis ikono. Vere mankis iuj detaloj, sed bone videblis, ke ĝi estas ikono de Sankta Dipatrino. Trajan ekstremis. Li sidiĝis, pli ĝuste falis sur la teron elĉerpita, senforta, laca. La ikono tremis en liaj manoj. En lia kapo kiel en muelejo batiĝis sennombraj demandoj, supozoj, konjektoj. Kion signifis tio? Kiu kaŝis la ikonon ĉi tie? Kial kaj kiam oni enfosis ĝin? Kial ĝuste li devis malkovri ĝin? Trajan ne povis respondi al tiuj ĉi demandoj. Nur profunde en si mem li sentis, ke kun li okazas io stranga. Li ne estis pia. Tre malofte li eniris templon, sed nun iu granda interna forto obsedis lin. Ne estis hazarde, ke ĝuste li trovis tiun ĉi ikonon. Ja, tiom da trezorserĉantoj fosis ĉi tie kaj neniu ĝis nun trovis ĝin. Estis hazardaj nek la koloraj flamoj, kiujn li vidis hieraŭ nokte, nek la sonĝo pri la junulino en la neĝoblanka robo. „Kio estas la homo kaj kio povas okazi kun li?” - meditis Trajan.

Li stariĝis, atente volvis la ikonon per sia ĉemizo kaj ekiris al la vilaĝo. Trajan decidis iri al pastro Stajo kaj rakonti al li pri la okazintaĵo. Pastro Stajo estis serioza, edukita persono kaj certe li diros ion pli pri la ikono.

La pastro estis en la korto de sia domo sen sutano kaj okupiĝis pri la abelujoj. Trajan salutis lin.

- „Dio benu vin, mia filo,” respondis Stajo. „Kio gvidas vin al mi?”

Per kelkaj vortoj Trajan rakontis kion li travivis hieraŭ nokte, kiam li veturis al la vilaĝo. Li ankaŭ menciis sian sonĝon kaj diris pri la fosado sub la olda saliko sur la senarbejo Patrina Larmo. Fine Trajan elprenis la ĉemizon kaj montris la ikonon.

Pastro Stajo prenis ĝin per tremantaj manoj, krucsignis kaj longe ĝin rigardis.

- „Ĝi estas ege, ege malnova. Strange, kiu ĝin kaŝis tie? Eble oni deziris savi ĝin. Ja, la legendo rakontas, ke iam tie estis monaĥejo. Ĝia malkovro estas Dia signo. Sur Patrina Larmo ni devas konstrui templon aŭ kapelon.”

Trajan atente alrigardis lin.

- „Pastro, mi entreprenos la konstruon. Ja, mi estas konstruisto.”

- „Dio benu vin, filo mia. Via ago estos granda kaj benita.”

Jam dum la sekva diservo en la vilaĝa templo pastro Stajo diris al la vilaĝanoj pri la ikono kaj petis ilian

► helpon por konstruo de kapelo sur Patrina Larmo, tie, kie iam estis la bela blanka monaĥejo. La vilaĝanoj miris. Iuj diris, ke tio estas Dia signo, aliaj ne deziris kredi, sed ĉiuj bone konis Trajan kaj neniu supozis, ke li povus elpensi tion. La homoj estis konvinkitaj, ke nun venis la momento por la trovo de la ikono kaj Dio mem elektis Trajan por tio.

- „Jes,” - diris la vilaĝanoj - „Trajan estas bona kaj honesta homo kaj nehazarde Dio elektis lin por trovi la sanktan ikonon. Nehazarde li vidis la koloran brilon kaj li songis la mirindan songon.”

Multaj vilaĝanoj kredis, ke la ikono de la sankta Dipatrino havas sanigan forton kaj ili preĝis antaŭ ĝi. Pastro Stojto metis la ikonon je la centra loko en la templo kaj multaj homoj de aliaj vilaĝoj venis vidi ĝin kaj preĝi antaŭ ĝi.

Oni komencis rapide kolekti monon por la kapelo. La homoj malavare donis monon, konvinkitaj, ke la kapelo nepre devas esti konstruita sur Patrina Larmo. Ili eĉ opiniis, ke delonge jam devis konstrui kapelon tie, por ke ĉiu sciu, ke iam sur Patrina Larmo estis monaĥejo.

Trajan estis la animo kaj la koro de la kapelkonstruo. Kiam la kolektita monsumo jam sufiĉis oni difinis tagon por la inaŭguro de la konstruado.

En la komenco de oktobro la kamparaj laboroj jam estis ĉe la fino kaj la vilaĝanoj ankoraŭ kolektis nur la vinberon. La homoj havis pli da libera tempo kaj multaj venis por la solena inaŭguro de la konstruado. Estis agrabla aŭtuna dimanĉo. Sur Patrina Larmo la arbofolioj jam flaviĝis kaj mola ora sunlumo brilis sur la tuta senarbejo.

Solene pastro Stojto komencis la akvosanktigan diservon. La homoj festvestitaj staris silente kun brulantaj kandeloj mane. Pastro Stojto ankoraŭ ne estis fininta la diservon, kiam proksime, sur la vojo, haltis nigra aŭto kaj



el ĝi eliris tri viroj, kiuj rapide ekpaŝis al la homamaso. Antaŭe iris la partisekretario de la vilaĝo Stojtanov, alta svelta persono. Stojtanov proksimiĝis al la homoj, disigis ilin kaj ekstaris antaŭ pastro Stojto.

- „Pastro,” - diris krude Stojtanov - „mi avertis vin! Ne inaŭguru la konstruon de tiu ĉi kapelo! Ni loĝas en socialisma lando kaj ne kapelojn, sed uzinojn ni devas konstrui!”

Post tiuj ĉi vortoj Stojtanov severe alrigardis la homojn, kaj iom pli akre fiksrigardis Trajan. Estiĝis profunda silento. Pastro Stojto staris

kiel ŝtonigita kaj nur la granda arĝenta kruĉo tremis en lia mano. La homoj maltrankvile rigardis unu la alian kaj ne sciis kiel agi. Iuj el ili eĉ komencis foriri.

Stojtanov komprenis, ke lia subita apero ĉi tie havis efikon kaj li ne dubis, ke post kelkaj minutoj neniu restos sur Patrina Larmo. Kontenta Stojtanov ekiris al la nigra aŭto, ĉe kiu atendis lin la aliaj du viroj, kiuj verŝajne ankaŭ estis partifunkciuloj eble el la urbo. Stojtanov marŝis rapide al la aŭto, tamen subite li falis, kvazaŭ iu forhakus lin. La homoj de la senarbejo kaj la du viroj de la aŭto ekkuris al li. Kelkaj, kiuj unuaj proksimiĝis, kliniĝis super li kaj iu el ili time ekflustris: „Li mortis.”

Sur la senarbejo estiĝis tumulto. Iuj el la homoj forkuris, aliaj provis levi la korpon de Stojtanov kaj porti al la aŭto.

Trajan rigardis senmova kaj nevole meditis: „Ĉu tiel naskiĝas la legendoj?” ■

Atentigo

Istvan Ertl atentigas ke en lia novelo Jarmilŝanĝo (MONATO, 10/2001, p. 24) antaŭ ĉiu nova alineo devus aperi blanka linio – pri kio li ne pensis atentigi la redakcion.


Kolektu viajn valorajn ekzemplerojn de MONATO en praktika plasta kolektilo.

En unu kolektilo vi povas mem facile bindi 12 numerojn.

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo:
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: retbutiko@fel.esperanto.be
Prezo 9 EUR (plus afranko).

Se vi mendos 3 ekzemplerojn, vi ricevos kvaran senpage!

Monato
INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA



Kiel la afero Jesuo rilatas al la Judoj?



Pri tio ekzistas du respondoj, unu pozitiva kaj unu negativa. La pozitiva estas, ke Jesuo kaj liaj unuaj adeptoj estis kaj restis Judoj. Tial la komencon de la Kristanismo ni devas kompreni el la Judismo. La negativa respondo estas, ke poste la Kristanoj sin apartigis kaj ekrigardis la Judojn kiel malamikojn. Ili opiniis eĉ ke tio estis la intenco de Jesuo. De tiam esti Kristano ŝajnis egali kontraŭ-Judismon. Pro ĉi-ambaŭ kialoj ni ne povas preparoli Jesuon aparte de la Judoj.

Paĝoj: 158; ilustrita; 21 cm; kudre bindita;
Prezo: **11,00 €**

Informoj:
tlf. +32 3 234 34 00;
tlk. +32 3 233 54 33;
rete: butiko@fel.esperanto.be
<http://retbutiko.esperanto.be>

Furoro de 

libroj

Esperanta Ŝindler

Mi apartenas al la generacio de genepoj, kies geavoj batalis dum la dua mondmilito. Por ni, sekve, la milito estas nur kinofilmoj, spektakloj, libroj, sed, sendube, plej grave – personaj atestoj de tiuj, kiuj postvivis.

Pro tio, kaj ankaŭ procent aliaj kialoj, la libro de Nina Langlet *Kaoso en Budapeŝto* estas tre bezonata. Ĝi estas bezonata ĝenerale, en ajna lingvo, en ajna lando. Tamen la apero de esperanta versio estas aparte tre aplaŭdinda.

Unue pri la libro mem. Sendube, kiam ektemas pri savo de judoj dum la dua mondmilito, ĉiuj pli-malpli kinemaj homoj tuj rememoras la Oskar-ricevintan filmon *La listo de Ŝindler*. Ĉi tio estas logike aperanta, sed tute malprava referenco, ĉar estas du tute malsamaj aferoj, kvankam ambaŭ same vivnecesaj kaj utilaj. Ja gesinjoroj Langlet agadis ne en Germanio, sed en Hungario, kaj tute alimaniere – ili havigis al gejudoj protektajn leterojn de Sveda Ruĝa Kruco, malkiel Ŝindler, doninta al gejudoj laborlokojn. Do, estas tute nekomparendaj aferoj.

Kaoso principe estas kunmetaĵo de diversaj faktoj, atestoj kaj rakontoj, plejparton el kiuj Nina Langlet spertis mem. Sed la origina teksto estas klare ne redaktita, kaj eĉ temas ne pri iuj stilaj detaloj (tiujn oni ja ne povas rimarki per traduko), sed pri ĝenerala kompilo de la libro. Ĉar la aŭtorino priskribis ne grandan tempoperiodon (de marto 1944 ĝis majo 1945), verŝajne estus pli racie strikte sekvi la kronologion de la eventoj. Iom embarasis min preskaŭ en la komenco de la libro tralegi pri tio, kiel kelkaj personoj renkontis la Venkon, kaj jam en la sekva paĝo reveni en la militan teruron. Postrestas la opinio, ke la aŭtorino simple notis siajn rememorojn, ne tro zorgante pri logiko de la tuto. Tio certe neniel fuŝas la ĝeneralan impreson, tamen kelkfoje iom stumbligas leganton.

Sed ekzistas alia riproĉo, jam pli grava. En la tuta libro estas tre malbone videbla figuro de Valdemar Langlet mem, do ĝuste tiu, kiun oni siatempe nomis „Esperanta Ŝindler” (denove la samaj komparoj). Sed legantoj ja, eĉ se



ne deziras legi ekskluzive pri s-ro Langlet, almenaŭ interesiĝas pri li ne malpli ol pri s-ino Langlet. Kaj lia personeco estas priskribata nur en la lasta ĉapitro, dediĉita al lia tuta vivo, sed ne al lia konkreta agado en Budapeŝto. Pro tio oni ne povas ricevi plenan impreson pri la rolo kaj graveco de s-ro Langlet dum la „kaoso en Budapeŝto”.

Kaj nun pri la traduko kaj eldono. Tre dankindaj estas kaj la tradukinto Kalle Kniivilä, kaj not-kompilinto István Ertl. Ilia laboro estas grandega kaj kvalita. Sed al ambaŭ estas unu tre grava plendo. En la libro estas troega abundo da hungaraj nomoj kaj titoloj. Certe, tio ne estus manko, se oni note aldonus prononcon de ĉiu nomo. Sed tio ne estis farita, kaj anstataŭe fine de la libro oni trovas nur listeton de hungaraj literoj kaj instrukciojn kiel legi tiujn. Sed tio ne plifaciligas la legadon – ja ne eblas ĉe ĉiu nomo turni sin al la lasta paĝo. Kaj krome, foje ĝenas legadon, kiam notoj okupas pli da paĝa spaco, ol teksto mem (sed tio verŝajne estas plendo al la eldonintoj). Laste menciendas la plej granda presa fuŝaĵo: en mia ekzemplero post la 128a paĝo mi trovas denove la 113an, kaj la sama teksto ripetiĝas ĝis la 120a, kaj tuj poste sekvas la 137a. Ok paĝoj inter la 128a kaj 137a restis por mi mistera kaŝaĵo.

Sed ĉi tio neniel pensigu eventualan leganton, ke la libro estas neleginda – tute male. Ĝi estas nepra por pli profundigi percepton kaj ĝeneralan impreson de la dua mondmilito. Nur trastudinte *Kaoso* oni povas havi plian pruvon, ke ĉio montrata en kinofilmoj, kaj ĉio rakontata de diversaj verkistoj, estas vero. La kruelaĵoj de faŝistoj, la suferoj de pluraj popoloj kaj etnoj, la sangorabaj bataloj por la Libero – ĉio ĉi estas la plej malĝoja ero en la tutmonda historio. *Kaoso en Budapeŝto* inde kompletigas la historion. Grigorij AROSEV

Nina Langlet: *Kaoso en Budapeŝto*. Tradukis Kalle Kniivilä. Komentis István Ertl. Eld. Bambu, Varna, 2001. 168 paĝoj glue binditaj. ISBN 954-9637-08-5. Prezo ĉe FEL: 9,30 eŭroj + afranko.

Libro el malnova verkista arkivo

István Nemere estas la plej fekunda verkisto – kaj en la hungara literaturo, kaj en la originala esperanta. Ĝenerale, li apartenas al la plej produktivaj verkistoj en la tutmonda literatura historio – li estas aŭtoro de proksimume 300 libroj! Do, la apero de lia nova libro en Esperanto ne estas mirinda afero – de li jam ĉirkaŭ 20 libroj, verkitaj en la verda lingvo aperis!

Nemere verkas en diversaj ĝenroj: psikologia romano, filozofia eseo, akra aventuro, detektiva rakonto, scienca fantazio, esploro pri „flugantaj teleroj” – elekto de la ĝenro dependas, verŝajne, de la momenta humoro de la aŭtoro. Ĉi-foje ni tenas en la manoj klasikkarakteran scienc-fantazian romanon, verkitan kun streĉa enhavfadenado.

El fora kosmo sur la Teron trafis – cetere, hazarde – sendito de iu alt-evoluanta civilizo – aŭtomata objekto, produkto de supera teknologio. Ĝi ne volas, ke la homoj ĝin malkovru, kaj strebas kiel eble plej rapide forlasi la teron, kiu ja ne estis ĝia celo, sed hazarde mortigas homon, pro kio ĝin komencas persekuti polico. Kaj la libro rakontas pri la persekutado kaj aperanta kompreno inter kelkaj homoj kaj la kosma estaĵo. Cetere, la kosma estaĵo fine fakte kompensas la komencan murdon – ĝi savas homan vivon! Bonege estas transdonita la ĉasista psikologio de policano, por kiu la sola celo estas kapti – ne gravas kiun kaj kial; sukcesas ankaŭ kelkaj aliaj psikologiaj portretoj – ili estas, se ne tro profundaj, tamen sufiĉe trafaj.

La ideoj kaj la enhavo de la libro ne estas tro originalaj – tia originaleco ĝenerale ne karakterizas verkojn de Nemere, kaj aperas en scienc-fantaziaj verkoj ne ofte. Tamen la libro estas fortike ĉarpentita, atentokapta kaj leĝere legebla por esperantistoj de ĉiuj lingvo-niveletoj – de spertuloj pri Esperanto-literaturo ĝis komencantoj-progresantoj, por kiuj ĝi povas fariĝi la unua legita Esperanto-libro. Eraroj, pro bona laboro de la redaktintoj, preskaŭ forestas, same preskaŭ ne estas strangaj kaj nekomprenoblaj esprimoj. Do, la legaĵo ne elstara, sed agrabla kaj rekomendinda por ĉiuj – kaj speciale por ŝatantoj de sciencaj fantaziaĵoj de la 60aj-70aj jaroj, kies stilon ĝi bone imitas.

Tamen, leginte la libron, oni ricevas la impreson, ke ĝi ne nur stile similas tiaspecajn verkojn de tiu epoko, sed ankaŭ estis verkita tiutempe! En la romano estas menciataj uson-sovetiaj rilatoj, eksplodoj en Bejruto kaj simile, aktualaj en la 1980aj jaroj, plej malfrue en 1986!

Samtempe, ne estas mencioj pri Interreto, poŝtelefonoj kaj similaj ordinarajoj de la 1990aj jaroj, necesaj por la enhavo de la libro, se ĝi estus verkita nuntempe. Do, mi opinias, ke la aŭtoro simple trovis sian malnovan manuskripton de la komenco de la 80aj jaroj, ial tiam neeldonitan, ordigis ĝin sen zorge prilabori, kaj decidis aperigi ĝin nun. Ĉio tio neniel malvalorigas la verkon – ja ni kun



plezuro legas malnovajn verkojn – sed simple atentigas ŝatantojn de Nemere-verkado pri tio, ke oni ne taksu ĝin por sekvi la evoluon de la verkmetodo kaj stilo de la preferata aŭtoro. Oni nur komprenu, ke temas pri romano el la frua periodo de lia verkado.

Nikolao GUDSKOV

István Nemere: *Vizito sur la teron*. Eld. Impeto, Moskvo, 2001. 168 paĝoj. Prezo ĉe FEL: 10,00 eŭroj + afranko.

Furoro

Ĉiumonate, la 10 plej furoraj libroj en la Retbutiko
<http://retbutiko.esperanto.be>

1 David Galadí-Enríquez kaj Amri Wandel

La kosmo kaj ni Prezo: 18,00 EUR



2 Anna Löwenstein

dua eldono La ŝtona urbo Prezo: 24,00 EUR

3 K.J.K. Vroegop

Johano Prezo: 7,50 EUR

4 Ulrich Matthias

Esperanto: la nova latino de la eklezio Prezo: 7,95 EUR

5 August Vermeylen

La migranta judo Prezo: 8,00 EUR

6 Lena Karpunina

La bato Prezo: 12,00 EUR

7 Peter J. Tomson

La afero Jesuo kaj la judoj Prezo: 11,00 EUR

8 Leopold Vermeiren

Brulanta kastelo Prezo: 3,00 EUR

9 Emile Van Damme kaj Christiane De Vleminck

Leksikaj ekskursoj (2) Prezo: 14,00 EUR

10 Pasporto al la tuta mondo

(parto 9-12) Prezo: 81,00 EUR

Ĉiuj tiuj libroj estas ankoraŭ akireblaj ĉe FEL:
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: retbutiko@fel.esperanto.be
Fakse: + 32 3 233 54 33

Romano el la flandra literaturo

En ĉi tiu malgranda sed poezieca kaj esprimforta romano, la aŭtoro pakis la esencon de sia vivo kaj karaktero. La majstraĵo konsistas en tio, ke li abstraktas sian propran travivaĵon kaj rekonkretigas ĝin en konata historia periodo, tiu de la Nazaretano. Tiel, li reduktas siajn spertojn al simbola rakonto, transportante vivon kaj strebadon de individuo al nivelo universala. Li donas al sia rakonto filozofian substraton kaj en tiu maniero levas ĝin al tuthomara realeco.

La migranta judo



Paĝoj: 72; ilustrita; 21 cm; vinktita;
Prezo: **8,00 €**

Informoj:
tlf. +32 3 234 34 00;
tlk. +32 3 233 54 33;
rete: butiko@fel.esperanto.be
<http://retbutiko.esperanto.be>

Furoro de 

Spirokapta historia fresko

La Biblio ne estas unu libro, ĝi estas biblioteko plurĝenra; sed la fiksado de tia sankta libraro ne estis unufoja por ĉiam kaj por ĉiuj: konfesioj diversaj rekonas kiel sanktajn, kolektojn diversajn, kaj la agnosko de tia tekstaro evoluis dum jarcentoj. La juda tradicio rekonas la tekstojn, kiujn fiksas kiel kanonon la hebreaj rabenoj en la unua jarcento p.K.; tiu tekstaro eksplicite ellasas la frukristanajn verkojn, ekzemple, la *Novan Testamenton*, kies akceptiĝo kaj famiĝo riskis iel perdigi la ortodoksecon de la origina hebrea religio. Sed ankaŭ el la Malnova ne ĉiuj verkoj estis konsiderataj en la „unua kanono”, kiu ampleksas nur la *Toraon*, la *Profetajn Librojn* kaj la *Skribojn*; aliaj, akceptitaj de la kontraŭreformacia katolika eklezio longe poste, dum la Trenta Koncilio (1546), estas konataj sub la nomo de *Duakanonaj libroj*. En ili troviĝas epizodoj, kiuj influis la okcidentan kulturon kaj inspiris okcidentajn artistojn, kiel tiu pri Suzana insidata ĉe la bano de du maljunuloj, aŭ tiu pri Judit senkapiganta Holoferneson. La akcepto aŭ ne de iuj tekstoj kompreneble donas malsaman interpreton de la vorto de Dio, kiu transdoniĝas tra la „Sanktaj Libroj”: ekzemple la resurekto de ĉiuj justuloj, aŭ la purgatorio kun nur dumtempa puno, temoj kutime supozataj kiel aperantaj nur en la *Nova Testamento*, troviĝas jam en la libro de *Makabeoj*; kaj akcepti aŭ ne, ke vivantoj povas pledi por mortintoj por mallongigi ilian suferon, donas tute alispecan teologian aspekton al la koncepto pri peko kaj puno.

Ĉar Zamenhof sekvis la ortodoksan judan tradicion, li rekonis kiel bibliajn nur la librojn de la „unua kanono”, kaj do en lia traduko de la „La Sankta Biblio”, oficiale akceptita nur en 1926 dum la UK en Edinburgo, mankas la libroj celebrataj de aliaj tradicioj, inkluzive de la tuta *Nova Testamento* kaj de la duakanonaj. Akademiano Gerrit Berveling tradukis kaj la kvar evangeliojn (la tradukoj aperis en *Fonto* en 1992), kaj la duakanonajn librojn, el kiuj en ĉi tiu unua volumo aperas *Tobit*, *Judit*, *Esther* kaj la du unuaj libroj de *Makabeoj*.

La traduko de Berveling estas jam konata tra kompakta disko aperinta en 1997, kaj ĝi aperos ankaŭ,

apud la zamenhofa traduko, ĉe la *Brita kaj alilanda Biblia Societo*. Sed tie mankas la tuta kritika aparato trovebla en la nuna eldono: sintezaj, sed plene klaraj enkondukoj al la diversaj libroj, klarigoj pri la originalaj tekstoj, pri la formiĝo kaj fiksiĝo de la „kanonoj”, historiaj kaj geografiaj notoj. La Biblio estas verko, kies kompreno engaĝas plene la menson kaj la kulturon de leganto, kaj la preparo al la legado fare de Berveling estas ekstreme utila. La nunan libron krome plivalorigas pluraj gravuraĵoj de la franca artisto Gustave Doré, kiu ilustris multajn ĉefverkojn, inkluzive la Dian Komedion de Dante Alighieri (kies dua kantiko, *Purgatorio*, freŝe aperis ĝuste ĉe *Fonto*) kaj kiu postlasis pli ol 10000 desegnojn.

Ĉe tia grandiozaĵo, verkita en diversaj periodoj, jam la difino de aŭtentike originala teksto estas problemo; krome, la lingvaĵo estas defia por tradukisto. La nun ekzistantaj tekstoj de la duakanonaj libroj estas en la greka, kvankam de kelkaj ekzistis pli fruaj versioj en la hebrea aŭ aramea, pri kio atestas iuj papirusoj. Berveling, fakulo kaj instruisto pri klasikaj lingvoj, referencas al la versio de la Septuaginto, la plej aŭtoritata; sed ofte li profitas de aliaj versioj kaj tradukoj. Lia laboro estis kolosa, kaj li elturniĝis majstre; rezulte, lia lingvaĵo estas simpla, kun tuj kompreneblaj disigitaj propozicioj, sed li tenas la solenecon, kiam tio spegulas la originalon. La historioj rakontataj en la diversaj bibliaj libroj, kvankam ne ĉiam kongruaj inter si, tamen donas spirokaptan historian freskon pri la vivo de la hebrea popolo kaj precipe pri ĝiaj bataloj kontraŭ la najbaroj, bataloj subtenataj de la senŝancela konvinko esti la popolo elektita de Dio. Kiu konas aliajn librojn el la Biblio, ne miros pri la kruelco de la militoj kaj pri la amasaj buĉadoj, kalkulataj je pluraj dekmiloj da homoj. La juda Dio helpas sian popolon, sed liaj agoj montras ja ne pardonemon, sed la juston de severaj kondamnoj; necesos la veno de Jesuo kaj lia elaĉetado de la pekoj de la mondo, por ke la homo, laŭ la kristana religio, havu esperon pri paradizo.

Carlo MINNAJA

La Duakanonaj Libroj. Vol. 1. Eld. Fonto, Chapecó, 2001. 264 paĝoj. Prezo ĉe FEL: ankoraŭ ne konata.

Monato

MONATO, internacia revuo sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo; monata revuo en la internacia lingvo Esperanto; legantoj en 65 landoj; fondinto: Stefan Maul; 22a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato; abontarifo varias laŭlande (petu ĝin de la eldonejo).

Eldonejo: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono +32 3 234 34 00, telekopiilo: +32 3 233 54 33, retpoŝto: monato@fel.esperanto.be TTT: <http://monato.esperanto.be> Valida anonctarifo: n-ro 9; kompostita kaj presita en la eldonejo.

Ĉefredaktoro: Stefan Maul, Pferseer Str.15, D-86150 Augsburg. Retpoŝto: smaul86150@aol.com

Redakcia sekretario: P. Peeraerts.

Reviziantoj: Hèctor Alòs i Font, Edmund Grimley-Evans, Jens S. Larsen, Brian Moon, Alexander Schlafer, Katalin Kováts, Anna kaj Mati Pentus, Mikaelo Lineckij. Krome elsarkas erarojn la kontrolilo de la tekstprilaborilo Ĉapelilo 2.1.

Grafiko: Hugo Fontyn, Jean Pierre VandenDaele, Guido Baeyens.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj; represo kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-rajto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendu ĝin pagante 9,08 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen.




- ## MONATO - redaktoroj
- Arto:** Grigorij L. Arosev, ab/ja 31, RUS-117071 Moskva, Ruslando.
Reta adreso: desperanto@mtu-net.ru
- Ekonomio:** Roland Rotsaert, Visspaanstr. 97, 8000 Brugge, Belgio.
Reta adreso: rotsaert@esperanto.be (nur askiaj dosieroj!)
- El mia vidpunkto:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, 86150 Augsburg, Germanio.
Reta adreso: smaul86150@aol.com
- Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselsgasse 59, 4700 Eupen, Belgio.
Reta adreso: jp@fel.esperanto.be
- Eseoj:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.
- Hobio:** Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, 1010 Wien, Aŭstrio.
Reta adreso: a9308197@unet.univie.ac.at
- Komputado:** Edmund Grimley Evans, 20 Stone Street, Cambridge, Britio CB1 2PL.
Reta adreso: edmund@rano.org
- Leteroj:** Aimo Rantanen, Haapalammentie 13 as 6, FIN-40800 Vaajakoski.
Reta adreso: monato-leteroj@fel.esperanto.be
- Libroj:** Boris Kolker, 25 Severance Center Drive, #203, Cleveland HTS, OH 44118, Usono.
Reta adreso: kolker@stratos.net
- Nota:** Librorecenzojn oni ne sendu al la redaktoro proprainciate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.
- Lingvo:** YAMASAKI Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio.
Reta adreso: syama@dokkyo.ac.jp
- Medio:** Haszpra Ottó, Húr u. 9A, III. lph. I/3, H-1223 Budapest.
Reta adreso: haot@freemail.hu
- Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.
Reta adreso: 100103.3317@compuserve.com
- Noveloj kaj Poezio:** Geraldo Mattos, R. João Motter 98, BR-81210-260 Curitiba, PR Brazilo.
Reta adreso: mattos@super.com.br
- Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.
Reta adreso: 100103.3317@compuserve.com
- Scienco:** Haszpra Ottó, Húr u. 9A, III. lph. I/3, H-1223 Budapest.
Reta adreso: haot@freemail.hu
- Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Mussenhage 8, NL-8011 BH Zwolle, Nederlando.
Reta adreso: gerrit.en.madzy@planet.nl
- Sporto:** Grigorij L. Arosev, ab/ja 31, RUS-117071 Moskva, Ruslando.
Reta adreso: desperanto@mtu-net.ru
- Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, 86150 Augsburg, Germanio.
Reta adreso: smaul86150@aol.com
- Turismo:** Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, 1010 Wien, Aŭstrio.
Reta adreso: a9308197@unet.univie.ac.at

Se la temo de artikolo, kiun vi verkis aŭ intencas verki, ne troviĝas en la supra listo, tiam ne sendu la tekston al MONATO.

PUBLIKA LETERO

Kontraŭ via lingva hegemonio



Sinjoro Bush, sinjoro Blair!

1. Laŭ kiu rajto vi devigas nin aliajn, streĉe studi vian gepatran lingvon, la anglan, dum viaj civitanoj devas lerni neniun fremdan lingvon, por interkompreniĝi tutmonde?
2. Ĉu vi pretas forigi tiun ĉi maljustaĵon kaj subteni la demokratian solvon de la lingvoproblemo?
3. Aŭ ĉu vi timas – kiel Hitler kaj Stalin – perdi vian potencon, se ĉiuj senpene povos interkomuniki per la internacia lingvo Esperanto?

Iniciato Esperanto por ĉiuj – nun!

La honesta respondo


Pro iu eraro de oficisto efektive la adresatoj trovis la supran publikan leteron (kompreneble en angla traduko) sur siaj skribtabloj. Jen, kion ili respondis persone:

1. Laŭ la natura rajto de la plej forta.
2. Ĉu mi estu freneza kaj perdu mian privilegion?
3. Vere, danĝera lingvo! Imagu, se kanajloŝtatoj aplikus ĝin kontraŭ ni!

La oficiala respondo

La du registaroj reagis per jena oficiala deklaro:

1. Ni devigas neniun. Tion reguligas la merkato tutmondiĝanta.
2. Ni ne havas la potencon influi tion. Kompreneble ni subtenas ĉian demokratian solvon, se ĝi konformas al niaj intereso.
3. Kompreneble ne – ni ja ne estas diktatoroj! Kiel demokratoj ni devas tamen defendi la rajton de niaj elektintoj, ĉie ajn uzi sian gepatran lingvon. Neniu rajtas devigi ilin anstataŭigi ĝin per Esperanto!



Kiel fariĝi sukcesa krimulo

Kon Fu Zita nun tre fieras pri sia frato Aku. Dum multaj jaroj la faroj de Aku Zita estis familia sekreto, sed nun Aku eldonis libron *Kiel fariĝi sukcesa krimulo*. Lia verko estas ne teoria afero, sed baziĝas sur realo kaj veraj spertoj. Jen la indekso, per kiu oni povas ekkoni la valoron de la libro.

Steĉjo NORVELL

Kiel fariĝi sukcesa krimulo

de Aku Zita

Fakulo utiligas proprajn spertojn por elmontri la vojon

Enhavo

Ĉapitro	paĝo
Kiel presi sendifektan falsan monon	3
Kiel elspezi falsan monon sen konvikto	12
Kiel reagi al policano, kiam vi estas arestita	29
Kiel trovi lertan defend-advokaton	41
Metodoj por manipuli la justic-sistemon	58
Kiel korupti prokuroron kaj ĵurion	72
Resti aplomba malgraŭ malfavora verdikto	87
Kiel influi juĝiston por gajni mallongan puntempon ...	99
Kiel plani 25 jarojn en malliberejo	111
Aranĝu vian prizon-vivadon kiom eble plej bone	125
Transvivu izolatan loĝadon en punĉelo	136
Kiel trompi la komisionon pri amnestio	144
Kiel ĝui ĝismortan karcero-vivon	167

— anoncetoj —

Nova adreso de Jorge Camacho Cordón:
Paravicanos 14, 2° ext. izq., ES-28039
Madrid, Hispanujo.

La nova realismo de Bruno Vogelmann, libro pri kiu la fama FUTUROLOGO Robert Jungk diris: „Tio estas la mondkoncepto de la estonteco.” Cetere tamen inkludanta la ĝisnunajn religiojn kaj mondkonceptojn. Bazita sur la Nova Pensado, instruas ties regulojn. Tria eldono 1998. Bele bindita. 192 p. Prezo 13,50 eŭroj. Ĉie havebla. Tradukita en 20 lingvojn. El nepagipovaj landoj skribu al Sandra Vogelmann, Boeblingerstr. 386 en DE-70565-STUTT GART.

En **Naturista Vivo**, organo de INOE (Internacia Naturista Organizo Esperantista) ekde nun aperos ankaŭ kolorfotoj. La revuo aperas kvarfoje jare en A5 formato, sur minimume 4*16 paĝoj. Baza abonkotizo 14 EUR (por eksocialismaj kaj triamondaj landoj 7 EUR). Petu provexempleron kontraŭ 1 IRK de la nova redaktoro/kasisto de INOE, Jozefo Nemeth, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5. Rete: jozefo@nl-papa.hu.

www.edukado.net



La servo por instruistoj kaj lernantoj de Esperanto

(Re)Abonu FONTO-n! La sola sendependa monata literatura revuo en Esperanto **FONTO** en januaro komencis sian 22an jarkolekton: numeroj 241 - 252. Aperas 12 numeroj jare - sendataj ĉiam po du samkoverte. Kun riĉa kaj varia enhavo. Por la tuta jaro 2001 tio kostas nurajn 30 dolarojn! Pagu al UEA - konto bays-f - kaj samtempe skribe aŭ rete in-

formu la redaktoron Gerrit Berveling en Zwolle, Nederlando. Eblas kompreneble pagi per FEL, kiu estas unu el niaj perantoj! Ankaŭ ĉiuj antaŭaj jarkolektoj estas ankoraŭ haveblaj: nemalhavebla kaj riĉega *fonto* de la literatura E-historio de la lastaj 20 jaroj! Ĉiu jarkolekto 30 dolarojn; pri rabato por la tuto samtempe eblas interkonsenti.



En Leuven (Belgia Loveno) La universitato
SIEK KAJ K.U. Leuven
Scienco kaj Socio

20 Julio 2002 Pli da informoj? Esperanto3000@esperanto.be
Esperanto 3000, Rue Ménada 44, 1320 Hamme-Mille, Belgio 26 Julio 2002

Internaciisto: Organo de Internacia Komunista Esperantista Kolektivo (IKEK). Ĝi aperas ĉiun duan monaton. 16-paĝa D-A4. Ĝia enhavo temas pri socialismo kaj komunismo. IKEK akceptas rilatojn kun aliaj organizaĵoj samcelaj. Interesiĝantoj petu provexempleron: Internaciisto, str. Font Nova 32, 08202 Sabadell (Hispanio).

Kreu vian propran librokatalogon! Per la komputila programo de la Retbutiko (<http://retbutiko.esperanto.be>) vi povas krei librolistojn laŭ via propra deziro! Ĉu vi deziras libroliston pri nur romanoj, aŭ pri poezio aŭ pri ĵus aperintaj verkoj? Aŭ ĉu vi preferas liston de difinita aŭtoro, ekzemple de ĉiuj haveblaj verkoj de Marjorie Boulton aŭ de Nemere? Eble vi volas nur scii, kiu estas la aŭtorino de *La ŝtona urbo* aŭ kiu estas la eldonjaro de *Murdo en Esperantujo*? Ĉio tio eblas en la retbutiko en momento kiu plaĉas al vi, tage kaj nokte, senpage. Vizitu nin. Vi estas bonvena!

ESPERANTO aperas dusemajne



Eventoj

La plej ofta internacia gazeto pri la Esperanto-movado

EVENTOJ

La plej ofta internacia gazeto pri la Esperanto movado, pri okazaĵoj en Esperantio kaj pri aplikado de Esperanto.
Petu provexempleron de:
Eventoj
Pk. 87, Hu-1675 Budapest, Hungario
Rete: eventoj@esperanto.org

pk. 87. Budapest, H-1675, Hungario
Telefono kaj fakso: +36-1-2828885
eventoj@hungary.net

La libroj, kasedoj kaj diskoj menciitaj en la anoncetoj estas mendeblaj de FEL, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; tlf. +32 3 234 34 00; tik. +32 3 233 54 33; rete: butiko@fel.esperanto.be aŭ per TTT de <http://retbutiko.esperanto.be>

Nova sistemo por instrui la internacian lingvon



Mendu la PAL-version ĉe:
Flandra Esperanto-Ligo
Frankrijklei 140
B-2000 Antwerpen
Tel:+32 3 234 34 00
Reto: butiko@fel.esperanto.be

Prezo de lecionoj 1 ĝis 4:
81 EUR + afranko
Prezo de lecionoj 5 ĝis 8:
81 EUR + afranko
Prezo de lecionoj 9 ĝis 12:
81 EUR + afranko

ESPERANTO PASPORTO AL LA TUTA MONDO

Ĉu tute nova sistemo por instrui la internacian lingvon? Efektive. Vi ja estas preta ekaventuri en la lernadon de Esperanto. Tamen, ne domaĝu kelkajn minutojn por rigardi la mapon. Tiel vi komprenos la vojon kiun sekvos via lernado kaj kiel vi laŭiros ĝin.

Jam de la komenco vi plene trempiĝos en la lingvo. Ne timu, tamen, vi ne dronos! Ĉio subtenos vian komprenon dum vi konatiĝos kun la sono kaj uzado de la lingvo. Esperanto havas apartajn avantaĝojn kompare kun la tasko kiu frontas lernantojn de aliaj lingvoj. Ĉar ne ekzistas neregulaj formoj kaj esceptoj, tiuj ne bremsas la

disvolvon de lingvaj intuicioj. Dum vi rigardos la lecionojn, vi ekhavas ĉiam pli kaj pli da memfido pri tio kion vi lernas. Ĉiufoje vi komprenos pli el la kunteksto de la materialo prezentita. Memoru ke plej gravas lasi la materialon enflui sen ĉagreniĝo pro tio ke vi ne tuj komprenas la tuton. Vi konstatos la rezultojn kiam vi donos al vi okazojn por praktiki kaj uzi la lingvon. Ni nun vidu kiel kaj kial ĝi funkcios por vi...

Prof. Duncan Charters

Prezidinto de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj